La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №3

Bazaj informoj pri “La Ondo de Esperanto”

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №3 (325)

La Ondo de Esperanto **aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.**
Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.
Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.
Eldonas kaj administras: Halina Gorecka
Redakcio:
Aleksander Korĵenkov (redaktoro)
Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro)
Peter Baláž
Stanislav Belov
István Ertl
Irina Gonĉarova
Povilas Jegorovas
Wolfgang Kirschstein
Paŭlo Moĵajevo
Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando
Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com
Retejoj: https://esperanto-ondo.ru, https://sezonoj.ru
Abontarifo por 2026
Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 850 rubloj
Amiko: 30 eŭroj, 34 usonaj dolaroj, 1700 rubloj
Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 5500 rubloj
Anonctarifo
Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)
Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)
Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)
Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)
Triona rabato pro ripeto.
Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.
Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.
Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2025, №3 (325).
Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.
Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.
Подписано в печать: 6 октября 2025 г.

© La Ondo de Esperanto, 2025

En ĉi tiu numero

Bazaj informoj pri “La Ondo de Esperanto” 2
En ĉi tiu numero 3

Redakcie 5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Nova etapo de “La Ondo” 5
Aleksander Korĵenkov. “Esperanto-novaĵoj”: Pli ol 700 abonantoj 5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. 2100 tagoj da ĉiutaga informado 6

Temo 7
Jukka Pietiläinen. Bona, programriĉa kaj interesa kongreso en Brno 8
Rezolucio de la 110a Universala Kongreso de Esperanto 11
La estraraj fakoj distribuitaj 12
La definitiva statistiko de la 110a Universala Kongreso de Esperanto 13
Novaj honoraj membroj de UEA elektitaj en Brno 14
Sep diplomoj pri Elstara kaj Elstara Arta Agadoj aljuĝitaj en Brno 14
La premio Deguĉi 2025 al Mónika Molnár 15
Aleksander Korĵenkov. Artikoloj pri ĉiuj UKoj okazintaj ekde la 1991a jaro 16
Science en Brno 17
Marek Blahuš. Kvinpersona kongreseto 19

Eventoj 20
Ulrich Brandenburg. BET-59: malgranda UK en Litovio 21
Povilas Jegorovas, Aleksander Korĵenkov. BET-59: 296 aliĝintoj el 32 landoj 23
Jouzas Olekas. Salutmesaĝo de Jouzas Olekas, Alta Protektanto de BET-59, vicprezidanto de la parlamento de Litovio 24
Gary Mickle. Kamparetosa SAT-kongreso 25
John Huang. Translima amikeco disfloras en Toronto 28
Floréal Martorell. Renaskiĝo de FESTO 30
Linda Le Nepveu. OFAJ: Speciala programo dum FESTO 33
M. Nufrio. Kultura Esperanto-Festivalo en Svislando 34
Marija Belošević. En la spirito de Jubileo 35
Ulrich Matthias. Itala Kongreso – sukcesega, kaj tamen en Esperanto 37
Bert Ŝuman. Greziljono: Lerni kaj praktiki Esperanton ĉiusezone 39
Zsófia Kóródy, Petro Zilvar. Dusemajna instruado en la Esperanto-urbo 41
Ineke Emmelkamp. Tri ZEOj en Groningen 42
Jagoda Greger. Esperanto sur la strando 43
Irina Gonĉarova. KLERo-2 – juna, ĝojplena kaj Esperanta 45
Irina Gonĉarova. La tria Kalejdoskopo de lingvoj en Odincovo 46
Ankica Jagnjić. La dua Adriatika Feriado en Prvić Luka 47
Aleksander Korĵenkov. UEA interkonsentis pri la vendo de sia domo 48
Kreita en UEA komisiono por Esperanto-agado ĉe BRIKS 49
Aleksander Korĵenkov. La Instruistoj de la Jaro 50
Estraro de TEJO 2025-2026 50
Smetanina denove gvidas la Ruslandan asocion 50
Aleksander Korĵenkov. Prepare al la 111a UK en Graco 51
La 82 IJK okazos venontjare en Katalunio 52
Invitu la Universalan kongreson en 2027 aŭ en 2028 53
Aleksander Korĵenkov. Kie kongresi en 2027? 53

Alberto Stalin Garrido. Filipinoj: UK ne, IJK jes! . . . 54
Kunorganizu la IJK-on en 2027 en via lando! . . . 55
JES 2025/2026 proksime al Berlino . . . 56
Lu Wunsch-Rolshoven. NR kaj NIS denove en Wiesbaden . . . 56
Novjarfesto en la Rejna Valo . . . 56
Koncize (7 novaĵoj) . . . 57
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas . . . 58

Tribuno . . . 59
Junaj esperantistoj kondamnas la agojn de Israelo . . . 60
Alvoko por Komuna Deklaro . . . 60
Komuniko de Kataluna Esperanto-Asocio pri Gazao . . . 62
Tago de Esperanto 2025: multlingvismo kaj paco . . . 63
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Paco . . . 64
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tradukada Tago . . . 65
Rezolucio de la 58a kongreso de ILEI . . . 66
Kirilo Brosch. Pri la signifo de "temi" . . . 67

Arkivo . . . 69
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2025 . . . 70
Wolfgang Kirschstein. Murdi oponantojn . . . 73
Aleksander Korĵenkov. Esperanto kaj merkatiko: 14 artikoloj de Dennis Keefe . . . 75

Kulturo . . . 76
Aleksander Korĵenkov. Pri Ŝukŝin oni povas rakonti diversmaniere . . . 77
Vasilij Ŝukŝin. Lupoj. Alfluginto. Li ankaŭ tiun konfuzis. Simbolo de kredo. Saluton al Beja! (Tradukis Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Nikolai Lozgaĉev, Ludmila Novikova) . . . 78
Paulo Sérgio Viana. La folio . . . 112
Laure Patas d'Illiers. Malmultekosta loĝejo . . . 115
Wolfgang Kirschstein. Almenaŭ unu savita manuskripto (Recenzo: Halldór Laxness. Sonorilo de Islando) . . . 120
Floréal Martorell. La kvara albumo de "Kaj Tiel Plu" . . . 123
Miguel Gutiérrez Adúriz. Rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2025 . . . 124
Valerio Dalla. Italaj belartaj konkursoj . . . 126
La gajnintoj de la 4a Interkultura Novelo-Konkurso . . . 127
La sesa Interkultura Novelo-Konkurso . . . 128
Traduk-konkursoj 2025! . . . 129
Aleksander Korĵenkov. Unesko-Kuriero pri malaperantaj glaĉeroj . . . 130
Literatura Foiro. 2025, №336 . . . 131
Literatura Foiro. 2025, №337 . . . 132
Thiago Ballestero. Nova redaktoro de "Kontakto" . . . 133
"Femina" resurektos en 2026 . . . 134

Mozaiko . . . 135
Stanislav Belov. Ha lo, polico! . . . 136
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj . . . 137
Perantoj de "La Ondo de Esperanto" . . . 138

Kovropaĝe: La tradiciiĝinta futbala matĉo inter la Esperanta kaj loka teamoj (po sep personoj) finiĝis per egala rezulto 5 kontraŭ 5, sed en la punŝota serio nia teamo venkis per tri goloj kontraŭ du – jen la fina venko! (Foto: John Huang)

Nova etapo de “La Ondo”

En majo 1991 aperis la proveldono de “La Ondo de Esperanto”, kaj ĝis aŭtuno 1997 ĝi aperis kiel dumonata soci-kultura revueto.

En aŭtuno 1997 “La Ondo” iĝis ĉiumonata gazeto, ensorbinta la primovadan parton de “Ruslanda Esperantisto”.

En 2007 estis lanĉita bitversio de “La Ondo” laŭ la pdf-normo, kaj dum dek jaroj kunekzistis la papera kaj reta formoj.

En decembro 2016 estis eldonita la lasta papera “Ondo”, kaj dum 2017-19 nia bitgazeto aperis ĉiumonate laŭ la normoj pdf kaj ePub.

En januaro 2020 la novaĵretejo “La Balta Ondo”, kiun ni fondis en 2010, ricevis la nomon “La Ondo de Esperanto” kaj de tiam dum pli ol du mil tagoj en ĝi ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto; la samnoma bitgazeto por ses jaroj iĝis trimonata, amlpleksa (ĉirkaŭ 130-140 paĝoj) bitgazeto.

Plia ŝanĝo okazos venont-jare. La ĉefa informado okazos ĉiutage en la novaĵ-retejo, kaj la gazeto transformiĝos al eĉ pli ampleksa jar-almanako (pli ol 200 paĝoj). Kelkfoje dum la jaro ĉiuj abonantoj, amikoj kaj patronoj ricevos informilon, kiu en-havos referencojn al plej interesaj publikaĵoj en la retejo kaj aldonan materialon.

Ni esperas, ke vi akceptos ĉi tiun ŝanĝon kaj subtenos la “Ondon” per abonoj kaj donacoj, por ke en Esperantujo plu ekzistu kaj evoluu la sola ĉiutage aktualigata sendependa novaĵretejo.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

“Esperanto-novaĵoj”: Pli ol 700 abonantoj

Telegramo estas senpaga nuba tujmesaĝilo por komputiloj kaj poŝtelefonoj. Esper-antistoj uzas ĝin por sendi tekstajn kaj voĉajn mesaĝojn kaj dosierojn, kaj por inter-komunikiĝo. En Telegramo funkcias grupoj, en kiuj oni interparolas pri diversaj temoj, kaj kanaloj. Kanalo estas unudirekta loko kun mesaĝoj pri difinita temo.

En julio 2023 estis fondita la Telegrama kanalo “Esperanto-novaĵoj”. La 23an de septembro 2023 al ĝi aliĝis cent abonantoj, kaj je la 1a de oktobto 2025 la kanalon “Esperanto-novaĵoj” abonas 728 personoj, kiuj ĉiutage ricevas kurtajn mesaĝojn.

Kun 728 abonantoj “Esperanto-novaĵoj” estas la plej populara Telegram-kanalo en Esperanto. Sekvas “Esperantaj memeoj” kun 544 abonantoj, sed dum 2025 en ĝi aperis nur unu novaĵo. En la tria loko estas “Libera Folio” (359); ĝin sekvas “Kontraŭ Espero” (339).

Se vi uzas Telegramon kaj vin interesas novaĵoj pri Esperanto, aliĝu al la kanalo “Esperanto-novaĵoj” ĉe https://t.me/esperanto_news.

AlKo

2100 tagoj da ĉiutaga informado

Hodiaŭ estas la 30a de septembro 2025, la 273a tago de la nuna jaro. Tio signifas, ke jam **dum du mil cent (2100) sinsekvaj tagoj** (kvin jaroj + naŭ monatoj) ekde la 1a de januaro 2020 en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” **ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto**. Ni memorigas, ke nia novaĵretejo (https://sezonoj.ru/) estis lanĉita antaŭ 15 jaroj, la 2an de septembro 2010, kiel “La Balta Ondo”. Ekde tiam en ĝi aperis 4152 tekstoj. Ilin garnas pli ol kvin mil (5413) ilustraĵoj.

Laŭ nia vizitkalkulilo, instalita komence de 2020, la plej ofte vizitita afiŝo (8 mil 404 vizitoj) estas la artikolo de la ĉefredaktoro de “La Ondo de Esperanto” pri la Ruslanda censo, verkita en decembro 2011. Ĝi estas la sola teksto, vizitita pli ol ok mil fojojn. En la dua loko estas la Korĵenkova artikolo pri la lastaj vivojaroj kaj morto de Zamenhof (5.857); ĝin sekvas la diskutartikolo “Granda skismo en Esperantujo” (5.795) de la Tjumena ĵurnalisto Stanislav Belov.

Entute, dum la lastaj 2100 tagoj jam 18 artikoloj estas legitaj pli ol tri mil fojojn, el kiuj 12 artikoloj legiĝis pli ol 4000 fojojn. Cetere, antaŭ 1100 tagoj, je la “Miltagiĝo” de nia ĉiutaga informado, nur tri tekstoj superis la nombron tri mil.

Vidu la liston de la dek kvin plej popularaj tekstoj en nia retejo:

8.404. Korĵenkov A.: Kiom da esperantistoj en Ruslando? Ne malpli ol 992
5.857. Korĵenkov A.: Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile…
5.795. Belov S.: Granda skismo en Esperantujo
5.575. Korĵenkov A.: La Unua Libro
5.242. Etsuo Miyoshi: Politikistoj de EU kaj Esperanto
4.905. Gorecka H., Korĵenkov A.: Sen Rodin sekvis sian edzinon
4.837. Gorecka H., Korĵenkov A.: Júlia Sigmond forpasis
4.808. Korĵenkov A.: La lasta ARKONES
4.677. Korĵenkov A.: Tolstoj kaj la unua Esperanta gazeto
4.264. BET-59: La unua informilo
4.142. Korĵenkov A.: Konciza biografio de Lazarj Markoviĉ Zamenhof
4.141. Szilvási L.: Oni haltigos la Esperanto-ekzamenojn en Hungario
3.909. La 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj
3.751. Belov S.: La pandemio kaj la homaro: konkludoj de la viruso
3.439. Martorell F.: Katastrofo ĉe Vinilkosmo

Unuafoje en la plejlisto aperis la artikolo de Szilvási László pri la haltigo de la oficialaj Esperanto-ekzamenoj en Hungario. Cetere, en la listo estas neniu artikolo pri okazinta Esperanto-renkontiĝo, sed estas tri artikoloj pri okazontaĵoj (du BEToj kaj unu ArKonEs); enestas neniu beletraĵo kaj nur unu teksto pri temo nerilata al Esperanto (eseo de Belov pri la koronvirusa pandemio).

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

La Komitato de UEA en Brno elektis novan estraron kaj novan prezidanton. Post du sinsekvaj prezidantoj el Norda Ameriko, la asocion unuafoje prezidas sudamerikano – Fernando Maia el Brazilo. Ni deziras al li fruktodonan laboradon! (Foto: John Huang)

Bona, programriĉa kaj interesa kongreso en Brno

110a Universala Kongreso de Esperanto
Brno, la 26an de julio – la 2an de aŭgusto 2025

La 110a Universala Kongreso de Esperanto en Brno/Burno (Ĉeĥio) estis eble malpli granda ol atendite. Jam la urbonomo montriĝis malfacila. La esperantigita nomo de la urbo iĝis Burno, tamen mi multe pli ofte aŭdis la nacilingvan formon Brno en la kongresejo.

Eventuale esperantistoj timis la varmegan someron en meza Eŭropo sed montriĝis, ke ĝuste dum la kongresa semajno la vetero en la kongresurbo estis agrable varmeta; ekzemple, en suda Finnlando ĉiutage estis pli varme. Krome pluvis en la komenco kaj ankaŭ poste. Rezulte multaj pluvombreloj perdiĝis kaj estis retrovitaj. Mi tamen perdis la mian.

La kongresejo troviĝis en du lokoj: Mendel-universitato kaj proksima hotelo. La distanco estis tolerebla, kiam oni unue trovis la vojon. La manko de mapoj iom senteblis en la komenco, kvankam bona mapo estis en la kongresa libro, sed oni esperus ion similan ankaŭ surmure en la akceptejo. Krome en la universitato la ĉefaj salonoj estis en unu konstruaĵo, sed la libroservo kaj la akceptejo en la alia. Nur en unu el ili troviĝis necesejoj por la kongresanoj, kaj en la alia estis ĉefa manĝejo kaj la disdonejo de la kongresa kuriero.

Foto: John Huang

La ĉefa kongresejo ĉe la universitato estis praktika, tamen en kelkaj salonoj la akustiko estis vere mizera kaj en aliaj mankis klimatizo, kio igis ekzemple la salonojn de KER-ekzamenoj iom varmegaj. Feliĉe ekstere estis ne tiom varme, kaj multaj kongresanoj ripozis sub arboj en la apuda herbejo.

En la inaŭguro aŭdeblis tri neesperantaj lingvoj, ne nur la ĉeĥa de la vicrektoro de la universitato, sed ankaŭ la pola de la direktorino de Pola Instituto en Prago kaj iom surprize la armena de la armenia ambasadoro. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la ukrainia kaj la ĉinia ambasadoj.

La novaĵo de la inaŭguro estis ĉe la landaj salutoj. Programero, kiu antaŭe daŭris longege kiam reprezentantoj de ĉiuj landoj prezentis sin, foje per unu frazo aŭ unu verbo, kaj kiu poste estis transformita al kontinentaj salutoj, nun revenis al landa nivelo, sed nur en formo de laŭtlegado de landonomoj kaj samtempa stariĝo de la kongresanoj el tiu lando. Kvanto de aplaŭdoj eventuale iel emfazis la sintenojn de la kongresanoj; ekzemple, post la ekstaro de ukrainianoj la aplaŭdoj estis inter la plej laŭtaj kaj longaj.

Dum la kongreso la komitato elektis novan estraron por UEA. La estraro proponita de la elekta komisiono estis akceptita kun unu ŝanĝo: forfalis István Szabolcs kaj eniris François Lo Jacomo. Por tio necesis dua voĉdonado, ĉar la du lastaj kandidatoj ricevis egalan nombron da voĉoj. Iom surprize forfalis Amri Wandel, kiu tamen ne estis en la listo de elekta komisiono, same kiel Lo Jacomo. Wandel tamen ricevis sufiĉe fortan aplaŭdon post la dankado de sia laboro en la estraro dum la malfermo. La scienca kaj kultura programoj estis pli ampleksaj ol kutime.

La nacia vespero disvolviĝis en la fortikaĵo Spielberg apud la urbocentro. Temis pri ĉeĥaj popoldancoj, sed laŭ miaj kunparolantoj la melodioj similas hungarajn kaj

La komitato de UEA voĉdonas (Foto: John Huang)

rumanajn. Ankaŭ la alia kultura programo estis tiom riĉa, ke necesis meti teatraĵon samtempe kun la bankedo. Mi do maltrafis la teatraĵon de “Verda banano”, pri kiu mi poste aŭdis kelkajn negativajn komentojn, kaj ke la homoj ne ridis kvankam temis pri humuraĵo.

La kongresa manĝejo estis tiu de la universitato kaj ĝi servis eĉ bieron kaj vinon. Elekto estis ampleksa por tiuj, kiuj manĝas ĉion. Mi tamen aŭdis, ke por vegetaranoj la elekto ne estis same vasta kaj ripetiĝis la samaj manĝoj. La pago estis ankaŭ simpla, laŭ la pezo de la manĝaĵoj mem elektitaj. Tamen io, kio funkciis bone por studentoj, ne same bonis por maljunularo: portado de pezaj pletoj ne facilis kaj pro la fremda mono la pagado malrapidis, feliĉe multaj uzis kreditkartojn.

La kongresa libro havis kiel novaĵon la prezenton de la ekskursoj, kiuj estis ankaŭ en la Dua bulteno. Bona ideo, ĉar ne multaj portas la Duan bultenon al la kongreso. Tamen el la kongresa libro forfalis la lokoj por la programeroj pri la kongresa temo, kvankam tiuj programeroj estis amplekse prezentitaj en la kongresa libro. Ankaŭ la datoj malĝustis en la programkalendaro kaj listigo, eventuale ili estis la pasintjaraj. La kongresa kuriero “La Drako de Brno” eble estis la plej malbone redaktata dum la postpandemiaj jaroj; ekzemple, la inaŭgura festparolado de la prezidanto de UEA aperis nur en ĵaŭdo anstataŭ lundo.

La komenca akcepto por la komitatanoj estis bona ŝerco, komence ĉeestis neniu oficisto aŭ estrarano, sed la komitatanoj povis senpage akiri drinkaĵojn kaj paroli inter si, sed malmultaj utiligis tiun eblecon. Tamen la komitatkunsidoj en si mem estis eble pli bonaj ol averaĝe dum la pasintaj jardekoj, la komitatanoj apenaŭ foriris el la temo kaj eble nur unufoje iu komitatano volis voĉdonon pri iu afero, kiu jam estis decidita.

La elekto de la novaj estraro kaj prezidanto donas multe da esperoj por la pli bona direkto al UEA (kiel ĉiam ĉe la nova estraro). Pri la prezidanto Fernando Maia mi povas esperi nur bonan, ĉar krom ke li estas literaturamanto, li eventuale eĉ komprenas ekonomion. Restas multe por esperi, ĉu la nova strategio (kiom longe ĝi estis jam farata) kaj la nova statuto portos pozitivajn ŝanĝojn.

La kongreso estis bona, programriĉa kaj interesa. Multe da novaj kaj malnovaj muzikistoj. La pason de la tempo eblas rimarki, kiam oni pensas, kiam ekzemple la grupo “Kajto” aŭ Kimo la unuan fojon prezentis en la kongreso.

Estis ankaŭ agrable vidi kreskantan internaciecon de la kongreso, kvankam kelkaj afrikanoj ne ricevis vizojn, estis pli da afrikanoj ol kutime en eŭropaj kongresoj. Al la estraro de UEA estis elektitaj eĉ du afrikanoj. Afrikano ricevis ankaŭ premion en Belartaj konkursoj, kio ne okazis en la pasintjara UK-109 en Afriko.

La libroservo, mia kutima loko se ne okazas io alia interesa, estis bone planita: multaj titoloj elĉerpiĝis rapide. Kroma ĝojosigno estas, ke finfine UEA kaj la Esperanto-Asocio de Britio interkonsentis pri la kondiĉoj de librovendado, kaj tiel la libroj eldonitaj de EAB revenis al la libroservo.

Jukka Pietiläinen

Rezolucio de la 110a Universala Kongreso de Esperanto

Inter la 26a de julio kaj 2a de aŭgusto 2025 kunvenis 1132 homoj el 63 landoj en Brno, Ĉeĥio, por partopreni en la 110a Universala Kongreso de Esperanto. Ni diskutis la temon “Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj”. Samtempe ni ilustris per nia propra agado, kiel bone la internacia lingvo Esperanto servas kiel ponto inter malsamlingvanoj el diversaj landoj kun diversaj spertoj kaj opinioj. Limiginte la traktadon de novaj teknologioj al ties komunikaj aspektoj, ni verkis raporton kaj surbaze de ĝi tiun ĉi rezolucion:

Kun ĝojo ni konstatas, ke la novaj komunikaj teknologioj ebligis signifan kreskon de la nombro de praktike atingeblaj Esperanto-parolantoj, pro kio la kono de Esperanto en konektita mondo fariĝas ĉiam pli valora por atingo de paco kaj konfido inter la popoloj;

Ni notas, ke artefarita intelekto (AI) por maŝina tradukado kaj, helpe de tio, multlingva komunikado fariĝis malmultekostaj kaj vaste uzeblaj;

Samtempe ni notas, ke la instigoj lerni fremdajn lingvojn malfortiĝas i.a. pro la uzo de AI kaj reduktiĝas lingva egaleco, kondukante al kultura provincismo;

Kun zorgo ni konstatas, ke estiĝas abundego da ciferecaj komunikiloj, per kiuj multaj homoj emas aliĝi al fontoj de informado kun samopiniaj grupoj, fortigante polusigon en la socio;

Ni atentigas, ke Esperanto plene taŭgas kiel internacia lingvo kaj jam posedas tutmondan komunumon de parolantoj, kiu kiel movado subtenas respekton kaj valorigon de fremdaj lingvoj kaj kultura diverseco;

Pro tio ni alvokas registarojn kaj la civilan socion en ĉiuj landoj:

• reveni al instruado ankaŭ de najbaraj lingvoj kaj enkonduki Esperanton kiel lernejan fakon por fortigi la senperan kontakton al najbaraj kulturoj kaj la neŭtralan alproksimiĝon al aliaj lingvoj; kaj

• labori por plifortigi la statuson de lokaj lingvoj kaj Esperanto kompare kun tiu de hegemoniaj lingvoj;

Ni konkludas, ke:

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:
https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Eventoj

Legante la sekcion “Eventoj”, vi ne povos malrimarki la nomon Arno Lagrange. En BET, KEF kaj SAT-kongreso Arno prezentis sian solspektaklon “La Ŝaknovelo” laŭ la samtitola ĉefverko de Stefan Zweig kaj prelegis pri la temo “Stefan Zweig, eŭropa verkisto”. La supra foto montras lian spektaklon en Kaŭno (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

BET-59: malgranda UK en Litovio

150-paĝa kongreslibro, ok eldonoj de kongresa kuriero, solenaj malfermo kaj fermo, libroservo, partoprenantoj el 32 landoj – ĉio memorigas pri Universala Kongreso, nur la dimensio estas iom alia. Al la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj de la 5a ĝis la 13a de julio en la litovia urbo Kaŭno (Kaunas) aliĝis 296 personoj, efektive partoprenis ĉirkaŭ 250. UK-simila estis ankaŭ la programo kun multaj paralelaj prelegoj, kursoj, koncertoj, tut- kaj duon-tagaj ekskursoj.

BET (origine "Baltia Esperanto-Tendaro") havas longan historion. La unua BET okazis dum la sovetia tempo somere de 1959 en Rigo. Partoprenis 48 esperantistoj, kiuj pagis po 150-200 rublojn por la restado. Unu el la tiamaj organizantoj ĉeestis ankaŭ la 59an: Bīruta Rozenfelde el Latvio. Dum jaroj la BEToj ankaŭ servis kvazaŭ pontoj al la esperantistaro en Ruslando: tion pro la vizaj malfacilaĵoj hodiaŭ ne plu eblas diri.

La inaŭguron de BET-59 ĉeestis kaj salutis, interalie, la vicprezidanto de la litovia parlamento Juozas Olekas, la EU-parlamentano Vytenis Andriukaitis – jam konata al multaj esperantistoj kiel iama komisionano de EU – kaj la prezidanto de la litovia ĵurnalista asocio Audris Antanaitis (ĉi-lastaj salutis en Esperanto). Skribaj salutmesaĝoj venis ankaŭ de la urbestro kaj de tri ministroj.

Aparte notinda estas la kunlaboro kun la universitato Vytautas la Granda, en kies konstruaĵo meze de la urbo gastis la evento, kaj kiu gastigis ankaŭ la inaŭguran akcepton. La universitato subskribis kunlaboran kontrakton kun la Litovia Esperanto-Asocio kaj ofertas Esperanton inter siaj studobjektoj.

Kion mencii el la programo? Simile kiel en UK al ĝi kontribuis la Akademio Internacia de Sciencoj (AIS/SUS) per pluraj prelegoj. Nur kelkaj ekzemploj: Amri Wandel

Foto: Gražvydas Jurgelevičius

Kjara ravis ĉiujn aŭskultantojn (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

kaj Karlo Spinola prezentis astronomiajn fenomenojn. Ilona Koutny prelegis i.a. pri interkultura komunikado kaj esperantologio. Ĉefe lingvopolitikajn temojn traktis Mark Fettes en sia serio de prelegoj, kaj István Ertl parolis pri siaj spertoj kiel tradukisto en la nuna mondo de aŭtomataj tradukiloj.

La muzika programo de BET-59 estis elstara. Al Kaŭno venis konatoj kiel JoMo, Kjara kaj Ĵomart kun Nataŝa, relativaj novuloj kiel Suzana kaj Mírek (SuMi) el Poznano, Lucio Avitabile kaj Mario Migliucci el Italio. La litova koruso “Gintaras” koncertis dum la inaŭgura posttagmezo.

Esperanto-kursoj okazis je pluraj niveloj. Iom tipaj almenaŭ por la BEToj en Litovio estis la prelegserio kaj kurso pri lokaj tradicioj kaj la loka lingvo. Ambaŭ – la prelegoj de Aida Čižikaitė kaj la kurso de Severija Banaitytė – trovis grandan intereson.

Inter esperantistoj Kaŭno estas konata kiel la naskiĝloko de Klara Zilbernik, la edzino de Ludoviko Zamenhof. Pluraj el ŝiaj familianoj lernis Esperanton. Ŝia patro ankaŭ finance subtenis la projekton de Ludoviko kaj tiel fariĝis unu el la unuaj mecenatoj de la Esperanto-movado. Ilia domo en Zamenhofo gatvė ankoraŭ ekzistas. Dum jaroj ĝi eĉ servis kiel sidejo de la Litova Esperanto-Asocio. Bedaŭrinde ĝi nun – post vendo al neafiŝita privatulo – estas disfalanta. Malpli konata estas la urbeto Vejsiejai en suda Litovio, en kiu Zamenhof loĝis dum kvar monatoj en 1885 kaj praktikis kiel kuracisto. Zamenhof-strato ankaŭ tie hodiaŭ memorigas pri li. Pri la rilatoj de Zamenhof kun Litovio detale prelegis Gražina Opulskienė.

Prelegas István Ertl, Ilona Koutny kaj Tim Owen (Fotoj: Gražvydas Jurgelevičius)

Simile al Universala Kongreso la programon kompletigis aro da duontagaj kaj unu tuttaga ekskurso.

Kiel al duafoja partoprenanto (unuafoje mi ĉeestis BEToN en Klajpedo antaŭ tri jaroj), mankas al mi la sperto por kompari. Kun 250-300 partoprenantoj evidente ne temas pri Universala Kongreso. Sed la programo similas, kaj la atmosfero estas pli familieca, ebligas persone konatiĝi kun granda parto de la ĉeestantoj. Aparte impresis min la laboro de la litoviaj esperantistoj, ilia lingva nivelo, la ĉiam fidinda teamo ĉirkaŭ Povilas Jegorovas, kaj la bonegaj kontaktoj kun ŝtataj kaj universitataj instancoj. Mi revenis el Kaŭno kun nova optimismo – ion pli bonan pri renkontiĝo apenaŭ eblas diri.

Ulrich Brandenburg

BET-59: 296 aliĝintoj el 32 landoj

Laŭ la definitiva statistiko al la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazis de la 5a ĝis la 13a de julio 2025 en Kaŭno (Litovio), aliĝis 296 personoj el 32 landoj. Reale partoprenis ĉirkaŭ 250 personoj. La plej multaj aliĝintoj estas el Litovio – 110. Sekvas Pollando kun 38 aliĝintoj.

Vidu la tutan laŭlandan aliĝtabelon:

110 Litovio
38 Pollando
16 Germanio, Koreio, Latvio
15 Italio
12 Francio
9 Ruslando (reale partoprenis nur 2)
7 Belgio, Estonio, Finnlando, Ukrainio

4 Svedio, Svislando
3 Hungario, Komoroj, Nederlando, Pakistano
2 Hispanio, Israelo, Katalunio
1 Aŭstralio, Britio, Burundo, Ĉeĥio, Kanado, Kongo DR, Luksemburgio, Skotlando, Turkio, Ugando

Dum la 21a jarcento Litovio gastigis ok BETojn. Tri el ili estis malpli amasaj ol BET-59, kaj kvar pli amasaj ol ĝi.

BET-37 (2001) en Noreikiškės – 303 aliĝintoj
BET-40 (2004) en Birštonas – 257 aliĝintoj
BET-43 (2007) en Šiauliai – 322 aliĝintoj
BET-46 (2010) en Visaginas – 185 aliĝintoj
BET-49 (2013) en Utena – 216 aliĝintoj
BET-52 (2016) en Birštonas – 334 aliĝintoj
BET-55 (2019) en Panevėžys – 450 aliĝintoj
BET-56 (2022) en Klajpedo – 263 aliĝintoj
BET-59 (2025) en Kaŭno – 296 aliĝintoj

(Ĉiuj BEToj, okazintaj ĉi-jarcente en Estonio kaj Latvio, laŭ la nombro da aliĝintoj estis malpli amasaj ol la Kaŭna BET en 2025.)

BET-60 okazos somere 2026 en Latvio.

Povilas Jegorovas
Aleksander Korĵenkov

Salutmesaĝo de Juozas Olekas, Alta Protektanto de BET-59, vicprezidanto de la parlamento de Litovio

Estimataj partoprenantoj, organizantoj kaj gastoj el la tuta mondo de la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj,

Mi elkore salutas vin ĉiujn, kunvenintajn en ĉi tiu speciala internacia evento, okazanta en Litovio – ĉe la Universitato Vytautas la Granda, kiu ĉi-jare fariĝas centro de kultura kaj lingvistika kunlaboro.

La lingvo Esperanto, kreita por la ideo de homa unuiĝo, hodiaŭ estas pli aktuala ol iam ajn por la mondo, kiu serĉas komunan lingvon – kaj laŭvorte, kaj metafore. Via komunumo atestas, ke dialogo, respekto al kultura diverseco kaj paca kunlaboro inter nacioj estas eblaj kaj necesaj.

Ni fieras, ke Litovio povas esti la hejmo de ĉi tiu sencoplena renkontiĝo. La ĉi-jara kunveno iĝu ne nur bonega okazo por interŝanĝi spertojn, sed ankaŭ ebleco por refoje plifortigi pontojn inter homoj, nacioj kaj ideoj.

Mi deziras al vi inspirajn diskutojn, novajn konatiĝojn kaj sencoplenan kuneston!

Kun respekto kaj sinceraj bondeziroj,

Juozas Olekas

Kamparetosa SAT-kongreso

La ĉi-jara kongresloko, la kastelo Greziljono apud la urbeto Baugé en la okcident-francia provinco Anĵuo, estis ŝatata, por multaj jam familiara loko, kulturdomo de kaj por esperantistoj (www.gresillon.org). Tie la kampara trankvilo efikis malstreĉe al la partoprenantoj de la laborriĉa kongreso (2025 aŭgusto 09-16) de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), la 98a en la historio de la pli ol centjara asocio, kiu kunigas politike heterogenajn, plejparte maldekstrajn elementojn de la laborista Esperanto-movado.

Ĉi-jare la foje renkontita politike motivita konfliktado plejparte malestis, je la kontento de multaj. Malgraŭ mondaj eventoj – precipe la milito en Ukrainio – provokantaj diversopiniecon dum la antaŭa jaro precipe en la retaj forumoj de SAT, la kongresa etoso restis kamaradeca. Disputoj ligitaj kun la agado de la opozicia grupo “SAT-amantoj”, asertanta ne sufiĉan reagemon ĉe la nunaj organoj de la Asocio je kritikantaj kaj dialogdezirantaj membroj, ne akriĝis.

Laborkunsidoj devis trakti kelkajn dornajn problemojn: la tro longe ne ĝisfine riparitan SAT-retejon (https://satesperanto.org/), la malfruiĝon ĉe la aperigo de la asocia organo “Sennaciulo”, nun eldonata en trimonata ritmo, la ĉiam ankoraŭ

Foto: Kani, CC0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=172299543

akratonan kaj por kelkaj homoj malinvitan etoson en la dissendolisto SAT-diskuto – ne malgrava afero, ĉar inter la retaj komunikiloj de la Asocio ĝi estas la plej malnovtradicia kaj multmembra.

Tio, kune kun aferoj kiel "revizio de la Statuto, plibonigo de la komunikaj rimedoj de la Asocio" menciiĝis en la Gvidrezolucio decidita fine de la kongreso, kiu skizas la proponatan agadon en la postsekvanta unujara periodo. Kongresanoj konstatis kun faciliĝo, ke la riparo de la retejo nun parte jam sukcesis kaj ke la ĉiudumonata aperritmo de "Sennaciulo" ŝajnas nun havi ŝancon reveni.

La interkonsento pri tiu Gvidrezolucio kaj la Deklaracio (pri la mondo ekster SAT kaj Esperantujo) ĉiam malfacilas. Des pli en la tri horoj, kiujn oni kutime asignas al tiu tasko. Sed fine la kongresanoj sukcesis, eĉ atingante relative grandan akordiĝon pri la ĉefaj punktoj.

Frakciaj kunvenoj de liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, verduloj kaj la Vegetara Sekcio ebligis pli neformalajn interŝanĝojn pri ties gruptipaj temoj. Kaj kvankam la kongreso kiel tuto ne povis esti hibrida, samtempe ĉeesta kaj perinterreta, kunveno pri la situacio en Afriko kun perinterreta partopreno de kamarado Alphonse en Goma (D. R. Kongo) efektiviĝis.

Kultura kaj prelega programo

Oni ne imagu, ke nenio amuza aŭ transcendanta la horizonton de la Asocio mem okazas en SAT-kongreso, en kiu granda parto de la kongresanoj pasigas matenojn en la laborkunsidoj. Male – ekskursoj kaj vespera kulturprogramo okupis almenaŭ duonon de la komune pasigita tempo.

Teme diversaj prelegoj kaj diskutrondoj okazis post la matenaj laborkunsidoj:

– Kani (José Maria Salguero): prezento pri libro ĵus aperinta ĉe SATeH, "Historieroj el alia vidpunkto", prezentanta epizodojn el la historio de Hispanio

– Tanya Ivanovna: "Anarĥiistoj en la revolucia movado por liberigo de Makedonio", traktanta ankaŭ la historion de rilatoj inter Makedonio kaj Bulgario

– Hyongjin Kwon: "Trans la konflikto: al mara civitaneco ĉirkaŭ la rokoj de Liancourt", neloĝataj insuletoj, rokoj en la maro inter Koreio kaj Japanio, kies aparteno estas pridisputata

– Pako Balibrea: "Juĝa kaj polica subpremo en la hispana ŝtato" – priskribita en rilato kun aktualaj kazoj

– Dieter Rooke: "Svisio sen armeo (GSoA): historio k nuntempaj iniciativoj" – la kontraŭmilitarisma organizaĵo GSoA kampanjas por abolo de la svisa armeo jam de 1982

– Annie Grente: "Rifuĝintoj en la insulo Lesvos" – kie la prelegantino de pluraj jaroj instruas la grekan al rifuĝintoj kaj konas bone ilian situacion

– Vito Markovo: "Peĉakuĉo pri speciismo" – ofte ignorata, ĉiam ankoraŭ preskaŭ universale praktikata diskriminacio surbaze de la specio ("Peĉakuĉon" ne ĉiu konas, ĝi estas mallonga, rapida temprezento.)

– Tabatha Fabri: “Laborista Esperanto-movado en Bruselo inter 1945 kaj 1972” – en la urbo agadis membroj de pluraj organizaĵoj

Vesperaj artaj kaj kulturaj programeroj estis simile diversaj:

– Raymonde Coquisart: Iom por ridi – amuzaj rakontoj

– Dieter Rooke: revoluciaj kantoj, en varma vespero eksterdome kun muzika akompano de pluraj kongresanoj, kiuj kunportis siajn instrumentojn

– Christophe Collay: koncerto kaj balo per violono, danciga

– Arno Lagrange: unupersona teatra dramo “Ŝaknovelo” bazita sur la samnoma verko de Stefan Zweig

Ekskursoj al la trogloditoj de Anĵuo kaj la Kokanjaj Ĝardenoj

Kulturhistorie interesa kaj kredeble por multaj nova konindaĵo estas la pli frua vivo de la “trogloditoj” de Anĵuo, loĝintaj en elkavigitaj subteraj kameroj postlasitaj de ŝtonminejoj kun miljara historio, kaj ankaŭ la ŝtonminejoj mem, el kiuj oni gajnis la konstruŝtonojn preskaŭ universale uzitajn en la regiono dum jarcentoj. (Tufŝtono, speco de kalkŝtono el sedimentaj deponaĵoj multmilionjaraj, devenas el la epoko, kiam maro kovris la regionon.) Ekskursantoj postspuris la vivon de tiuj trogloditoj, vidis iliajn artefaktojn. Ĝis la 1950aj jaroj ankoraŭ vivis malriĉuloj en tiuj subteraj ejoj kun somere kaj vintre konstanta malvarma temperaturo. Tuttaga ekskurso kondukis al du tiaj lokoj en Doué la Fontaine, fungokultivejo kun muzea karaktero en iam loĝitaj subteraj kavernoj, kaj Le Mystère des Faluns, kiu kombinis muzean prezenton pri la geologiaj kaj kulturhistoriaj aspektoj kun impona arta instalaĵo, en kiu projekciiĝas fantaziinspiraj bildoj sur la muroj de la dum jarcentoj kreitaj subteraj kameroj.

En alia tago la ekskurso kondukis al la malnova troglodita vilaĝo L’Orbière, kie troviĝas tre originala grandskala artista instalaĵo, helico, skulptita en roko super malnovaj homfaritaj kavernoj iam loĝitaj de kvin familioj de trogloditoj, konstruita de poldevena artisto en la 1980aj jaroj.

La tria ekskurso kondukis al la Kokanjaj Ĝardenoj proksime de Anĝevo, socia projekto helpanta homojn kun apartaj problemoj kaj forpelitaj el la labormerkato, reintegriĝi en la laborvivo per partopreno en produktado kaj loka disvendado de ekologie kreskigitaj legomoj.

Ĉi tiu kongreso kreskigis ne nur la personajn ligojn inter la opiniemaj SAT-anoj, kiuj partoprenis ĝin, sed ankaŭ la memfidon de la Asocio kiel tuto.

Gary Mickle

La jarabono por 2026 kostas nur 15 eŭrojn

https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Translima amikeco disfloras en Toronto

Toronto, unu el la plej multkulturaj urboj de la mondo, iĝis dum dek tagoj la viva centro de la Esperanto-movado en Nordameriko. De la 5a ĝis la 14a de julio 2025 la urbo gastigis du gravajn eventojn, ili estis: la tradicia Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) kaj la speciale kunordigita Dulanda Kongreso de Esperanto (DLK), organizitajn de la Kanada Esperanto-Asocio, Esperanto-USA kaj Esperanto-Toronto.

La unua parto de tiu esperantista festo estis NASK, okazinta de la 5a ĝis la 11a de julio en la kampuso (= tereno) de Toronto Metropolitan University. Lernantoj el pluraj kontinentoj kunvenis por partopreni en tri-nivela kurso: komencantoj, interuloj kaj spertuloj. La instruadon ĉi-jare gvidis internacie konataj edukistoj: Katalin Kováts, Rafa Nogueras, kaj Karina Oliveira, kiuj per siaj sperto, energio kaj didaktika talento kreis viglan, inspirplenan etoson. Ĉiu kurso estis atente strukturita por stimuli aktivan uzadon de la lingvo kaj profundigi interkomprenon inter la partoprenantoj. Vespere, la programo vivigis la kampuson per prelegoj, ludnoktoj kaj vizitoj al lokaj festivaloj.

Pli ol dek partoprenantoj sukcese pasigis la oficialajn KER-ekzamenojn (B1, B2, C1), kontribuante al la kreskanta komunumo de atestitaj esperantistoj. Surloke 14 personoj solvis la testojn, sed kelkaj ankoraŭ ne trapasis siajn intervjuojn. Paralele kun tiu sesio ekzameniĝis naŭ personoj el Eŭropo kaj Ameriko. La ekzamenon gvidis Katalin Kováts, kunekzamenis Duncan Charters, kaj helpis per deĵorado: Bill Maxey kaj Ruth Kevees-Cohen. Teknike kontribuis Andy Blair kaj Ĵosefo Carillo.

NASK: Rafa Nogueras instruas (Foto: John Huang)

Dulande en Toronto (Foto: John Huang)

Tuj poste, de la 11a ĝis la 14a de julio, okazis la Dulanda Kongreso – vere simbolo de translima kunlaboro. Kun pli ol 120 aliĝintoj el Kanado, Usono kaj el pli foraj landoj, la kongreso proponis intensan kaj varian programon sub la temo “Amikeco trans landlimoj”. Ĝi solene malfermiĝis per prelego de Humphrey Tonkin, grava figuro en la Esperanto-mondo, kiu en sia temo pri la historio de Esperanto donis al la ĉeestantoj profundan retrospektivon kaj inspiron por la estonteco.

Dum kvar tagoj, la partoprenantoj ĝuis prelegojn pri multaj temoj, ekzemple: komparo inter Kanado kaj Usono, la filmo “1910”, inkluziveco, traduko de bildstrioj, komerca uzado de Esperanto, lingvaj minoritatoj, kaj eĉ pri Toki Pona – minimumisma planlingvo, ktp. Inter ili troviĝis ankaŭ “Kien iru UEA?” – prelego de Duncan Charters. Ne mankis artaj kaj kulturaj momentoj: libroservo, kantado, poezio, improviza teatro, gufujoj kaj dancado.

Ekskursoj ankaŭ havis gravan rolon en la programo. La partoprenantoj de NASK kaj de la Dulanda Kongreso respektive ĝuis vizitojn al la fama CN Tower, la vigla Kensington Market, la fascina miniaturmondo Little Canada kaj la impona Royal Ontario Museum. Post la fino de la kongreso, granda grupo partoprenis en tuttaga ekskurso al la majestaj Niagara Akvofaloj kaj la ĉarmaj Toronto-insuloj, kiu altigis la emocian kulminon de la tuta sperto.

La kongreso kulminis per emociplena fermo, dum kiu aŭkcio kaj dankesprimoj al volontuloj spegulis la ĝojon kaj sukceson de la tuta aranĝo.

Estas menciinde, ke John Huang, la oficiala fotisto de la Universala Kongreso, respondecis pri la tuta fota dokumentado de NASK kaj la Dulanda Kongreso. La profesia filmado estis konfidita al Daniela Obando Tobar, kiu per sia talento kaptis multajn memorindajn momentojn.

John Huang

“Vojaĝo”: de maldekstre: Didier Jéol (drumisto), Didier Kerboull (basisto), Galis (kantistino), kaj Jean-Claude “Ĝiuzepe” Patalano (saksofonisto); ne videblas la klavaristo Gilles Bénard.

Renaskiĝo de FESTO

Post la lasta FESTO okazinta en 2014 en Dromo (orienta Francio) pluraj provoj reorganizi FESTOn malsukcesis. La nova teamo de JEFO (Junulara Esperantista Franca Organizo) relanĉis la ideon kaj proponis al EUROKKA rekunlabori partnere por nova FESTO-projekto. Fine ankaŭ la Esperanto-federacio de Okcitanio finance helpis ĉar la festivalo okazis en la strukturo de metilernejo de Moissac en Okcitanio…

La organiza teamo ekokupis la lokon sabate matene la 16an de aŭgusto por ĉion instali por akcepti la partoprenantojn kaj por la unua spektaklo de dimanĉa vespero. La teamo de EUROKKA prizorgis kiel kutime la artan programon kaj teknikaĵojn… Ŝirmita scenejo estis ekstere sur la herbejo de piedpilka tereno.

Dimanĉe 17an de la aŭgusto, la unua spektaklo eksonis je la 21a 30 horo post la oficiala malfermo de FESTO fare de la organizantoj per bonveniga anonco, prezentoj, anoncoj kaj rekomendoj diversaj… La Tuluza bando “Vojaĝo” malfermis la artan programon malkovrante premiere sian novan kantistinon. La kvinopa bando regalis nin per brila koncerto kies muzikinfluoj ŝvebis inter ĵazo, fuzaĵo, progresiva rokĵazo, mondmuziko kaj eĉ triphopo. Granda feliĉiga surprizo estis, kiam dum la koncerto Linda (la antaŭa kantistino) surscenejiĝis por plenumi kantojn kune kun la

aktuala kantistino Galis… Ĝiuzepe (JC Patalano) majstre ludis plurajn blovinstrumentojn (transversa fluto, saksofono tenora kaj soprana, klarneto kaj eĉ elektronika blovinstrumento) ĉio tio bone ritmigita de drumisto, basisto kaj klavaristo…

La publiko de FESTO povis esceptokaze spekti koncerton de “Vojaĝo” kun du kantistinoj! Eĉ la bando mem ne povis imagi tion antaŭe – grandega kaj belega surprizo por ĉiuj. “Vojaĝo” ludis interalie plej novajn kantojn kiuj aperos en venonta albumeto kiu nuntempe estas preparata… Post la vespera ekstera koncerto homoj testis la Trinkejdiskejon ĝis malfrunokte…

Lunde matene komenciĝis atelieroj por diversaj trejnadoj pri muziko, kaj vespere post eta pluveto okazis internacia ĵazpikniko, nova koncepto kiu ebligis la publikon gustumi diverstipajn landajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn dum koncertis la ĵazduopo Melono kaj Ĝiuzepe (piano kaj saksofono)… la ĵazpiknika koncerto vere svingis kaj daŭris ĝis malfruvespere… Sekve la gufujo malfermiĝis per piana koncerteto de Giorgio (itala pianisto kaj kantisto) kaj por fini la plej noktemaj diskejumis en la trinkejo…

Marde pro la pluva vetero matene okazis translokiĝo de la scenejo de ekstere internen en la grandan manĝejon, kaj vespere tie okazis unue koncerto de Kimo, kiu fervore kaj dancige etosigis la vesperon per plej famaj kantoj de “Amplifiki” kaj “Esperanto Desperado”.

Tuj sekve duaparte Platano (eksa La Pafklik) laŭ hiphopa stilo repis proprajn kantojn kaj ankaŭ kantojn kiujn li kantis en La Pafklik… Platano longe ne koncertis kaj estis mojosege vidi lin koncerti tiom plezure kaj efike ellasante abundan fluon de tekstovortoj reperitme… Ĉe la fina parto de lia koncerto Kimo revenis surscenejen por akompani akordione kaj kunkanti kun Platano… Memorinda vespero… Fine en la gufujo okazis koncerteto de Melono ĉe piano kaj Gijom’ ĉe kanto… kaj por fini Giorgio anstaŭigis Melonon por akompani Gijom’… Poste ĉe la trinkdiskejo estis lanĉita karaokea tranoktumo…

Merkredo estis ekskursa tago malgraŭ la pluva vetero kaj vespere post la vespermanĝo okazis premiera koncerto de Marta kun Estelle kaj JoMo, kiuj prezentis afrikajn kantojn de Mayoma kaj kelkajn pliajn novajn pli popajn, kiuj aperos en la venonta albumeto kiun preparas JoMo…

Post tiu unua parto JoMo koncertis sola per danciga repertuaro kiu finvarmigis la vesperon ĝis la gufuja koncerteto de Nael ĉe piano per klasika repertuaro… antaŭ ol startis la diskejo…

Ĵaŭde loka gitaristo-kantisto el Liono loĝanta nuntempe en Montauban, pli ol dek jaroj post siaj diskretaj adiaŭoj al la internaciaj scenejoj, Tifen revenis! Li ekis la koncertvesperon per esperantigitaj francaj kantoj aktualaj kun certa engaĝiĝo kaj acida humuro kiu plaĉe trafis la publikon. Post 40-minuta spektaklo Gijom’ Armide surscenejiĝis kaj ensorĉis la publikon per siaj piano-melodioj kaj emociaj kantoj el mikso de malnova repertuaro kaj de novaj kantoj kiujn li registras por nova albumo. Kortuŝa spektaklo tre ŝatata de la fan-publiko.

Sekvis en la gufujo koncerteto de kataluna kantistino Noa kun gitara akompano; Noa koncertis en mallumo misterŝveba kaj intimeca etoso laŭ la svingado de kelkaj kandelaj flametoj surplanke kaj bluruĝaj kolorlumetoj…

Vendrede la 22an bela vetero revenis kaj okazis denova translokiĝo de la scenejo eksteren por la du lastaj koncertvesperoj de FESTO. Estis speciala koncertvespero en kiu la OFAJ trejnantoj en la muzikateliero sub la gvido de Linda prezentis rezulton de la trejnadoj de la partoprenantoj. Sekve en la gufujo atendis esti ofertita al la publiko intimeca koncerteto de Kimo kiu flustris kvazaŭ lule per sia akordiono kaj voĉo ravante la ĉeestantaron… antaŭ diskejumi.

Sabate la 23an estis programita koncerta folka balo de “Kaj Tiel Plu” el Barcelono, sed pro ne neatendita enhospitaligo de Carles, flutisto kaj kantisto de la bando, la koncerto devis esti nuligita. Eksciinte tion merkrede, EUROKKA preparis helpe de diversaj artistoj ĉeestantaj, surprizan spektaklon por la sabata vespero. Tiel aperis la “Dancontaj Musoj… kiam la katoj…” (nova folka duopo kun violono, gitaro-perkutiloj kaj kanto), Giovanni akonpananta per gitaro kantistinon, Melono kun Gijom’ Armide, Giorgio kun Gijom’, Platano, Valentin akompanante sin per gitaro, Kimo sola kaj sekve kun Platano kaj laste kun Gijom’…

Por fermi FESTOn la organiza teamo surscenejiĝis por danki ĉiujn kaj specife la kunlaborantajn partnerojn kaj la helpantojn kiuj plenumis diversajn taskojn

Du legendoj kune: Kimo kaj JoMo

de manĝopreparado en la kuirejo, deĵorantojn ĉe la trinkejo kaj diskejo, purigado, reordigado, la artistojn pro la spektakloj, la teknikistojn pro la teknika plenumado, la trejnistojn pro la atelieroj kaj la partneroj EUROKKA kaj la Federacio “Esperant-okcitanio”.

Partpoprenis entute 120 homoj inkluzive de infanoj, organizantoj, helpantoj kaj artistoj… Estis pozitiva kaj kontentiga rezulto por la riĉa arta semajno kun la bedaŭro, ke la tre atendata “Kaj Tiel Plu” ne povis veni, sed vi tre baldaŭ povos ĝui ilian kvaran novan albumon kun sep kantoj, kiun ili finpreparas por eldono…

Estis ĝuinda Festo… kiam la venonta?

Floréal Martorell

OFAJ: Speciala programo dum FESTO

Paralele al la taga programo de FESTO, okazis la projekto “OFAJ”. Ĉi tiu projekto celis kunigi junajn francajn kaj germanajn muzikistojn de diversaj niveloj kaj muzikaj horizontoj, danke al financa subteno de la francgermana asocio “OFAJ”. Tio permesis al ĝiaj partoprenantoj progresi kun la helpo de instruistoj kaj dum la semajno krei komunan muzikan projekton, kiu estis prezentita dum la antaŭlasta vespero de FESTO.

Mi havis la plezuron gvidi la ĉeestantajn partoprenantojn, kune kun la aliaj trejnistoj Giorgio kaj Pol, en la evoluigo de ĉi tiu ambicia projekto, kiu plene kongruis al la spirito de tiu ĉi renkontiĝo, konstruita ĉirkaŭ muziko. Dum la semajno pluraj muzikprofesiuloj prelegis pri diversaj aspektoj de la muzika mondo: sontekniko (Giovanni kaj Melono), funkciado de muzikeldonejo (Flo), tekstotradukado (Gijom’), koruskantado (Pol kaj mi) ktp. La partoprenantoj ankaŭ renkontiĝis ĉiutage dum lingvolecionoj (en la franca aŭ la germana) kaj fine de la tago por ekzerci, improvizi kaj krei prezentaĵojn, kies finpretigon ni povis admiri dum la vendreda koncerto dediĉita al la projekto.

Mi ne estus honesta, se mi dirus, ke ĉi tiu projekto estis facila afero, sed malgraŭ tio mi estis profunde kortuŝita de la muzika universo de ĉiu el la partoprenantoj, same kiel de ilia arta scivolemo kaj malavareco. La fina koncerto surscenеje la vendredan vesperon estis belega kaj admirinda rezulto, reprezenta de ilia investo en ĉi tiu projekto kaj ankaŭ de la amika kunlaboro inter la partoprenantoj, el kiuj plej multaj neniam antaŭe renkontiĝis.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:
https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Tribuno

Gazao… Eĉ esperantistoj, individuoj kaj kolektivoj, malgraŭ la tradicia neŭtraleco kondamnas la agojn de la israela registaro kaj esprimas solidarecon al Palestino, “viktimo de ĉiutagaj masakroj kaj de milita strategio efektivigata kadre de pli vasta subprema plano”.

Foto de Jaber Jehad Badwan, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=159486769

Junaj esperantistoj kondamnas la agojn de Israelo

Itala Esperantista Junularo, Kataluna Esperanto-Junularo, Pola Esperanto-Junularo kaj aliaj asocioj kaj individuoj la 14an de aŭgusto en Cisarua, kie okazis la 81a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, subskribis alvokon, kiu prezentan “oficialan kondamnon al la agoj de la israela registaro kaj solidarecon al Palestino, viktimo de ĉiutagaj masakroj kaj de milita strategio efektivigata kadre de pli vasta subprema plano”. La dokumento estas subskribebla ĉe https://mallonge.net/alvoko.

Sube estas la teksto de la Alvoko.

La red.

Alvoko por Komuna Deklaro

Ni, junaj esperantistoj, kunsidantaj en Cisarua (Indonezio), okaze de la 81-a Internacia Junulara Kongreso, konsentinte pri la jenaj punktoj:

1. Kiel junuloj kaj esperantistoj ni sentas la moralan devon esprimi firman opinion pri tio, kio okazas nuntempe en la mondo.

2. Tial ke la esperantismo estas ofte akuzata pro troa idealismo, ni tamen opinias nenion pli realisma ol la sopiro je mondo en kiu popolo neniam subpremu alian, en kiu nenia kultura, ideologia aŭ lingva baro estu kialo por pravigi la ekstermon de alia popolo.

3. La homa tragedio de Palestino estas simbolo de tio, kion ni ne volas plu vidi en la mondo. Ĝi estas unu inter multaj kazoj de subpremado okazanta ĉirkaŭ ni. Ni staras klare kontraŭ ĉi tiu kaj ĉiuj aliaj formoj de subpremo.

4. La homaro jam atestis dum la pasinta jarcento similajn cirkonstancojn. La geopolitikaj streĉoj nun endanĝerigantaj la mondan sekurecon havas siajn radikojn en la maltoleremo kaj rasismo nutrantaj la homajn konfliktojn de jarmiloj. Ĉion ĉi ni kontraŭstaras – laŭ la pacaj kaj toleremaj idealoj kiuj animas kaj inspiras la esperantistaron. Ankoraŭ ne pasis jarcento ekde la tago kiam ni homoj kulpis pri la faligo de la atombomboj, tiel neniigante en kelkaj sekundoj la vivon de pli ol cent mil homoj, kaj tamen ni denove estas devigataj atesti mondajn gvidantojn cinike ludi per la vivo de civiluloj kaj per la estonteco de la homaro.

5. La historio de la homaj rajtoj konsistas el malgrandaj kaj grandaj agoj de solidareco: neniu povas antaŭvidi kiu signalo, vorto aŭ atesto povos inspiri individuon aŭ fortikigi subtenan reton. Paco konstruiĝas per vortoj kaj nutras sin per konkretaj agoj. Sed precipe la vortoj – aparte se publikaj kaj rektaj – estas mem agoj kaj havas plenuman valoron: ili kreas kulturon, influas la publikan opinion, kontribuas al konsciiĝo.

6. Kiel junaj esperantistoj, ni konscias ke ĉi tiu deklaro estas la voĉo de eta grupo, ni konscias pri ĝia limigita eĥo, sed ni volas emfazi, en ĉi tiu historia vojkruciĝo, la gravan bezonon unuanimigi niajn voĉojn kaj kune premi la instituciojn por ke ĉi tiu hororo ĉesu.

ASERTAS KE

7. Ĉar TEJO klare esprimis solidarecon al la popolo de Ukrainio, fronte al la agreso fare de la rusa registaro, per oficiala deklaro la 27-an de Februaro 2022, tial ni, kiel membroj de TEJO kaj subskribintoj de tiu ĉi manifesto, esprimas nian desapontiĝon pro la malfruo prezenti oficialan kondamnon al la agoj de la israela registaro kaj solidarecon al Palestino, viktimo de ĉiutagaj masakroj kaj de milita strategio efektivigata kadre de pli vasta subprema plano.

8. Ni esprimas saman kaj firman solidarecon al la israela popolo kaj al ĉiuj judoj en la mondo suferantaj fortajn diskriminaciojn pro la agoj de la israela registaro.

9. Estas distingo inter politika neŭtraleco kaj morala indiferento. Nia neŭtraleco ne povas iĝi alibio por eviti alprenon de pozicio pri gravaj malrespektoj al homaj rajtoj kaj antaŭ genocido de tuta popolo.

10. Rezigni niajn valorojn pro eksteraj agnoskoj kaj utilismaj konsideroj estas hontige kaj hipokrite. La rolo de Esperanto kaj de TEJO en la praktiko ne estis kaj ne estas nepolitika. Aserti ke TEJO ne estas politika organizo uzatas kiel ekskuzo por ne riski kompromiton de TEJO en la rilatoj kun aliaj naciaj, supranaciaj kaj internaciaj organizoj, kio povus endanĝerigi ĝian financan situacion kaj stabilecon. Ĉiama neŭtraleco senigas la esperantismon de ĝiaj idealoj kaj igas niajn asociojn kaj organizojn simplaj lingvokluboj.

11. Kiel junuloj, ni sentas nin responsaj antaŭenpuŝi alternativan aliron. Ni taksas necese distanciĝi de ĝeneralisma kaj neŭtralisma sinteno. ”La Espero” difinas la esperantistojn “pacaj batalantoj”, sed dum preskaŭ 140 jaroj ni tro ofte agis nur kiel inertaj spektantoj. Se multaj unuopuloj politike aktiviĝis por la komuna bono, tamen asocioj kaj kolektivoj preferis ŝirmi sin malantaŭ la slogano de neŭtraleco.

TIAL

12. Ni kondamnas la malrespektojn al la internacia juro fare de la registaro de Israelo kaj denuncas ĉiujn registarojn de la mondo kiuj inertecadis kaj daŭre inertecas pri la temo.

13. Kiel komunumo, pli ol movado, ni opinias ke nia voĉo kaj nia volo donas formon kaj muldas la destinon de niaj asocioj kaj organizoj. Ni decidas kio ni volas esti kaj, se necese, ni rajtas adapti la celojn de asocioj fonditaj dum aliaj ne plu aktualaj historiaj kuntekstoj en ion socie, morale kaj etike pli justan.

14. Ni alvokas TEJO-n kaj ĉiujn junularajn esperantistajn kaj neesperantistajn organizojn koncerte kunligi siajn voĉojn al la nia, por ke ĉi tiu ne akceptebla dramo atingu sian pacan epilogon kiel eble plej baldaŭ.

Cisarua, la 14an de aŭgusto 2025

La subskribintoj

INDIVIDUOJ: Gabriele Esposito Guido, Adam Damario Prakasa, Konrad Orawski, Yani K Wulandari, Syauqi Stya-Lacksana, Yang Hyun Joon, Utku Özdemir

ORGANIZOJ / ASOCIOJ: Itala Esperantista Junularo, Klub Esperanto Sahabat Museum Konperensi Asia Afrika (Ruĝa Formiko), GLAT-a Grupo en Sud-Koreio, Kataluna Esperanto-Junularo, Pola Esperanto-Junularo

Fonto: https://docs.google.com/document/d/

Komuniko de Kataluna Esperanto-Asocio pri Gazao

Kataluna Esperanto-Asocio, fidela al sia fondoprincipo antaŭenigi la internacian lingvon Esperanto kiel ilon de frateco kaj interkompreniĝo inter la popoloj, esprimas sian profundan konsterniĝon pri la nuntempaj okazaĵoj en Gazao.

La universalaj idealoj inspirataj de Esperanto, en plena harmonio kun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, morale devigas nin levi niajn voĉojn, kiam sistema ekstermado estas farata kontraŭ civila loĝantaro.

La raporto de Unuiĝintaj Nacioj de la 20a de septembro 2024 kondamnas la uzon de malsato kiel militmetodo (art. 24), la konscian detruon de san-instalaĵoj (art. 42) kaj la limigojn de humanitara helpo (art. 69), plenumatajn kontraŭ la civila loĝantaro de Gazao, kaj taksas ilin genocidaj agoj fare de la israela registaro[1].

Tiuj malobservoj de la internacia juro pliakriĝis: UN nuntempe raportas la murdon de almenaŭ 242 ĵurnalistoj[2], frontan atakon kontraŭ la libereco de informado kaj la rajto de la homaro ekscii la veron.

Kataluna Esperanto-Asocio aliĝas al la voĉoj, postulantaj tra la mondo la tujtujan finon de tiu genocido, okazigata antaŭ ĉies okuloj, sed plene senpuna, kaj reasertas sian engaĝiĝon defendadi la dignon de ĉiuj popoloj kaj la pacon.

Estraro de Kataluna Esperanto-Asocio

La 11an de aŭgusto 2025

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Arkivo

Antaŭ 75 jaroj, la 12an de oktobro 1950 naskiĝis Ulrich Brandenburg, germana diplomato kaj denaska esperantisto, prezidanto de Germana Esperanto-Junularo (1974-76) kaj Germana Esperanto-Asocio (2017-23), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, patro de du denaskaj esperantistoj. Ni kore gratulas nian abonanton, kunlaboranton kaj amikon okaze de la jubileo!
Foto: Ulrich Brandenburg en BET-59, Kaŭno (Gražvydas Jurgelevičius)

Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2025

3. Antaŭ 170 jaroj naskiĝis **Louis de Beaufront** (Louis Eugène Albert Chevreux; Bofró[n] 1855-1888-1935), franca instruisto, esperantisto kaj idisto, nomita "la dua patro de Esperanto" pro la sukcesa disvastigado de Esperanto; fondinto (1898) de la asocio SPPE (poste: SFPE) kaj ties organo "L' Espérantiste", reprezentanto de Zamenhof ĉe Hachette (1901-03), aŭtoro de pluraj lerniloj kaj prilingvaj libroj, inkluzive de la unua vera gramatiko de Esperanto "Commentaire sur la Grammaire de la Langue Internationale Esperanto" (1900); kompilinto de la antologio "Esperantaj prozaĵoj" (1902); en 1908 forlasis Esperanton kaj aliĝis al Ido, kiun li kunkreis.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 30-31.

4. Antaŭ 45 jaroj mortis **Eŭgeno Aisberg** (ruse: Евгений Давыдович Айсберг, france: Eugène Aisberg. 1905-1919-1980), ruslanda, poste sovetunia kaj francia inĝeniero kaj redaktoro (prezidanto de Internacia Unio de Radioteknika kaj Elektronika Gazetaro), kaj esperantisto; kunfondinto de "Internacia Radio-Revuo" (1925), en kiu aperis lia artikolserio "La babiladoj pri radio" (1926), poste diskoniĝinta libroforme kiel "Fine! Nun mi komprenas la radion!", kiu estas unu el plej multe tradukitaj libroj, verkitaj en Esperanto (pli ol 20 lingvaj versioj, inkluzive de la franca, kiu aperis jam en 29 eldonoj); honora membro de UEA (1980).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 11-12.

5. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Reinhardt Selten** (Zélten, 1930-1947-2016), elstara germana ekonimikisto, laŭreato de la Nobel-premio pri ekonomiko pro sia elstara kontribuo al la ludoteorio (1994) kaj esperantisto; dumviva membro de UEA (1969), fonda membro (1983) kaj honora senatano de AIS, rektoro de la Internacia Kongresa Universitato en UK-84 (Berlino, 1999); aŭtoro de "Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj: Ĉu mi lernu Esperanton?" (kun J. Pool, 1982, 2a eld. 1995) kaj "Por dulingveco en Eŭropo: Argumentoj kaj dokumentoj" (kun H. Frank, 2005); redaktoro de la studkolekto "La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado" (1997), aperinta ankaŭ en nacilingvaj versioj; ĉefkandidato de la germana sekcio de Eŭropo-Demokratio-Esperanto en eŭropaj elektoj en 2009, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1995).

12. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Ulrich Brandenburg** (1950-), germana diplomato

kaj denaska esperantisto, prezidanto de Germana Esperanto-Junularo (1974-76), redaktoro de "Pozitive" (junulara rubriko en "Germana Esperanto-Revuo"), prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (2017-23), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (2010), patro de du denaskaj esperantistoj.

16. Antaŭ 65 jaroj mortis **Valdemar Langlet** (Lanlé, 1872-1890-1960), sveda ĵurnalisto, diplomato kaj pioniro de Esperanto, ricevinta kun sia dua edzino Nina la honoran titolon "La justulo de la mondo" pro savado de judoj el la nazia persekutado en Budapeŝto (1944-45), kunfondinto kaj la unua eldonanto (1895-97) de la gazeto "Lingvo Internacia", organizinto kaj realiginto (kun E. Etzel) de la unua internacia vojaĝo per Esperanto (Finnlando, Ruslando, Rumanio, Aŭstrio-Hungario, Germanio), kunfondinto kaj la unua prezidanto (1896-1909) de Sveda Esperantista Societo, aŭtoro de "Esperanto ett korrespondens- och turistspråk" (1896); lia artikolaro "Vojaĝimpresoj" aperis kiel bitlibro en 2002.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 165-166.

17. Antaŭ 20 jaroj mortis **Bakin** (pseŭdonimo de Li Yaotang, alinome Li Feigan 1904-1921-2005), ĉina verkisto, socia kaj ŝtata aganto (vicprezidanto de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, prezidanto de Ĉina Verkista Asocio, prezidanto de Ĉina PEN-Klubo k. a.) kaj esperantisto; vicprezidanto (1980-86), prezidanto (1986-89) kaj honora prezidanto (1990) de Ĉina Esperanto-Ligo; kunfondinto de la societo Amikoj de Esperanto (1981); tradukinto de kvar Esperantaj libroj en la ĉinan: Akita Uĵaku. "Danco de skeletoj" (laŭ la traduko de Ŝuzui Haĵime, 1930), E. de Amicis. "La floro de l' pasinto" (laŭ la traduko de R. Junck, 1930), A. N. Tolstoj. "La morto de Danton" (laŭ la traduko de N. Hohlov, 1931), J. Baghy. "Printempo en la aŭtuno" (1932). Aperis Esperantaj tradukoj de tri liaj libroj: "Aŭtuno en la printempo" (1980), "Frosta nokto" (1990), "La familio" (1999). Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1981).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 20-22.

21. Antaŭ 85 jaroj mortis **Eduard Stettler** (Ŝtétler, 1880-1908-1940), svisa juristo, socia aktivulo kaj esperantisto; prezidanto de SES (1911-13, 1927-32), vicdirektoro (1910-19) kaj direktoro (1919-20) de UEA, prezidanto de UEA (1920-24, 1928-34), ĉefaŭtoro de du statutoj de UEA (1920, 1934); aŭtoro de libro pri H. Hodler (1928), en kiu estas prezentita la frua historio de UEA, kaj de pluraj artikoloj, precipe en la revuo "Esperanto."

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 266-267.

23. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Claude Nourmont** (Nurmón, 1945-1963-2022), franca instruistino kaj esperantistino, ekde 1976 loĝanta en Luksemburgio, prezidanto de TEJO (1975-77) kaj ĝia honora prezidanto (1978), prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto (1994-2001), vicprezidanto de UEA (2004-13), prezidanto de LKK de la 83a UK (Montpeliero, 1998), redaktoro de "Le Monde de l'espéranto" (2003-22), redaktoro pri arto de "Monato" (2005-22).

29. Antaŭ 65 jaroj mortis **Giorgio Canuto** (1897-1925-1960), itala medicinisto, fakulo pri jura medicino, universitata instruisto (rektoro de Parma Universitato, 1950-56) kaj esperantisto; vicprezidanto (1928-36) kaj prezidanto (de 1938 ĝis la baldaŭa malvigliĝo, 1950-60) de Itala Esperanto-Federacio; prezidanto de UEA (1956-60), vicprezidanto de LKK k rektoro de ISU en la 27a UK (Romo, 1935), membro de AdE (1953-60); post lia forpaso laŭ propono de Lapenna ĉe UEA estis kreita Fondaĵo Canuto, kiu ebligas membrecon al esperantistoj el nepagipovaj landoj.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 54-55.

31. Antaŭ 150 jaroj naskiĝis **Lev Zamenhof** (Лев Маркович Заменгоф, 1875-1998-1934), ruslanda, poste pollanda juda kuracisto kaj esperantisto, frato de Lazarj "Ludoviko" Zamenhof, konata en Esperanto kiel Leono Zamenhof; redaktoro de "Pola Esperantisto" (1908-1913), membro de la Lingva Komitato (1925-34); tradukinto de "Aspazio" de A. Świętochowski (1908), "Protesilas kaj Laodamia" de S. Wyspiański (1908), "Ave Patria, morituri te salutant…" (1909) kaj "El la konstituciaj Tagoj" (1910) de W. Rejmont, kaj de poemoj de kelkaj polaj poetoj en la kolekto "Mia Liro" (1909), kiu enhavas ankaŭ liajn originalajn poemojn.

Aleksander Korĵenkov

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm



Vasilij Ŝukŝin mortis nur 45-jara, sed liaj verkoj kaj filmoj plu estas legataj kaj spektataj. La supra bildo el lia plej ŝatata filmo "Fornoj-benkoj" (Печки-лавочки, 1972) montras lin: sola en granda vastaĵo. Neniu estas apud li…

Pri Ŝukŝin oni povas rakonti diversmaniere…

«La historion de la vivo de Ŝukŝin oni povas rakonti diversmaniere. Oni povas skribi heroecan verkon pri tio, kiel junulo el fora Altaja vilaĝo sukcesis Gagarinece (pli ĝuste Titovece, pro la samregioneco) mirinde flugi al la alto de sia tempo, iĝi granda verkisto, reĝisoro, aktoro kaj ricevi de la popolo dumvivan gloron, kiun la sorto malofte donas al ruso, ja oni kutime "ŝatas nur mortintojn". Sed oni povas verki ĉi tiun rakonton tute alimaniere, trovi malantaŭ la Ŝukŝinaj sukcesoj kaj atingoj rigoran kaj precizan planon, celadon al la sukceso, rompado de fremdaj sortoj – precipe de sortoj virinaj. Oni povas ankaŭ trovi en Ŝukŝin bonŝancan konformiston, kiu iris sur la pleja rando de la permesiteco; oni povas vidi lin rusa Sovetia patrioto, sed ankaŭ kaŝita kontraŭsovetiulo, nur ŝajniganta sin komunisto kaj lerte uzanta la avantaĝojn de socialismo. Oni povas rekoni en li la pretendon, kiun prezentis la rusa vilaĝo responde al tio, kion faris al ĝi la urbanoj, fremduloj. Oni povas trovi rafinitan venĝon, inteligentan huliganismon laŭ la spirito de lia protagonisto Glebo Kapustin, aŭ hidan kontraŭintelektulan arogantaĵon», – skribis Aleksej Varlamov en sia libro pri Ŝukŝin.

Sed ni elektos neniun el ĉi tiuj "onipovasaĵoj", cetere, multe pli ampleksaj ol unupaĝa enkonduko, kaj nun sekvas nur kelkaj bazaj faktoj eble sciindaj antaŭ legado de liaj verkoj.

Vasilíj Makároviĉ Ŝukŝín (Шукшин) naskiĝis la 25an de julio 1929 en la vilaĝo Srostki (Altajo), en kamparana familio de Makar Leontjeviĉ Ŝukŝin (1912-1933) kaj Marija Sergejevna Ŝukŝina (denaske: Popova, post la dua edziniĝo: Kuksina). En aprilo 1933 la 21-jara Makar Ŝukŝin estis pro denunco arestita, juĝita kaj mortpafita en Barnaulo – same kiel 72 liaj samviliĝanoj. La ĉagrenita Marija decidis haladziĝi, rampis en la kuirspacon de la granda vilaĝa forno kun siaj du beboj kaj fermis la fumtuban klapon, kaj se mirakle veninta najbarino ne eltirus ilin, ni neniam legus rakontojn, nek spektus filmojn de Ŝukŝin.

Negaja estis la infanaĝo kaj la junaĝo de la vilaĝaninaj gefiloj. Malriĉo, malsato, milito… Sed ankaŭ pasia legado…

Post la sepklasa vilaĝa lernejo en 1944 Vasilij eklernis en la aŭtomobila kolegio en la urbo Bijsk, sed post du jaroj kaj duono forlasis ĝin kaj revenis por unu jaro al sia vilaĝo. Poste la junulo ricevis pasporton (mirinde: ja tiuepoke la vilaĝanoj estis senpasportaj) kaj denove forlasis la vilaĝon, laborante en diversaj urboj, kaj servante en mararmeo (1949-52). Fine de 1952 li revenis al la vilaĝo, plenumis ekzamenon en la mezlernejo kaj … tute freŝdata abituriento sen iu ajn diplomo eklaboris kiel instruisto de la rusaj lingvo kaj literaturo en la vilaĝa lernejo por plenkreskuloj. Plia miraklo: baldaŭ li iĝis direktoro de ĉi tiu lernejo.

En 1954 Ŝukŝin veturis al Moskvo kaj studentiĝis en la Kinematografia instituro kaj ricevis diplomon en 1960. En 1958 li ludis sian unuan rolon en filmo kaj lia rakonto aperis en revuo. Li reĝisoris ses filmojn, el kiuj precipe elstaras "La ruĝa viburno" (1973) kaj rolis en dekoj da filmoj. Sed por ni plej gravas, ke li *ankaŭ* verkis: du romanojn, tri romanetojn, kaj pli ol cent rakontojn, aperintajn en literaturaj revuoj kaj en kvin novelaroj: "Vilaĝanoj" (1963), "Tie, fore" (1968), "Samlokanoj" (1970), "Karakteroj" (1973), "Konversacioj sub la hela luno" (1974). Li subite mortis sur ŝipo (tie okazis filmado) la 2an de oktobro 1974.

Estis ege malfacile elekti kvin el liaj 128 rakontoj, inter kiuj neniu estas malbona. Tamen mi elektis, kaj ĉi-foje, mallaŭ nia tradicio, inter ili estas du malnovaj tradukoj.

Aleksander Korĵenkov

Vasilij Ŝukŝin

LUPOJ

Dimanĉe, frumatene, al Ivano Degtjarev venis lia bopatro, Naĥumo Kreĉetov, ankoraŭ ne maljuna, vigla viro, ruza kaj ĉarma. Ivano malamis la bopatron. Naĥumo, kompatante sian filinon, toleris Ivanon.

– Ĉu vi dormas? – rapidis paroli Naĥumo. – Ho!.. Tiel, Ivaĉjo, oni povas pro dormo eĉ la ĉielan regnon maltrafi. Bonan matenon.

– Mi ne multe volas tien trafi. Ne rapidas.

– Vane. Ellitiĝu do… Ni veturu por arbotrunkoj. Mi elpetis de nia brigadestro du sledojn. Certe ne senpage, sed damne – ni ja bezonas brullignon!

Ivano iom plu kuŝis, meditis… Kaj komencis sin vesti.

– Nu, pro kio nia junularo fuĝas al urboj? – li ekparolis. – Ĉar tie homo faris sian taskon – kaj iru libere promeni. Oni donas al homo ripozon. Sed ĉi tie vi estas kiel malbenita: faru kaj faru ion, ĉu estas tago, ĉu nokto. Ĉu dimanĉo.

– Ĉu ni restu sen brulligno? – demandis Njura[1], la edzino de Ivano. – Oni ĉevalon al li liveris, sed li ankoraŭ malkontentas.

– Mi aŭdis: ankaŭ en urboj necesas labori, – aldonis la bopatro.

– Necesas! Tamen mi pli volonte irus fosi tranĉeojn por akvodukto: vi unufoje ŝvite streĉis forton, sed poste vivu sen zorgoj – kaj akvon havu hejme kaj centran hejtadon.

– Unuflanke, akvodukto certe estas bono; aliflanke – jena problemo: pro troa dormo vi tute ekvegetus. Nu, sufiĉe babili, ni veturu.

– Ĉu vi matenmanĝos? – demandis la edzino.

Ivano rifuzis – deziro mankis.

– Ĉu vi post la hieraŭa drinkado malsanas? – scivoleme demandis Naĥumo.

– Ĝuste tiel, via moŝto!

– Nu-u… Jen kiel. Kaj vi parolas pri akvodukto… Do, ni ekveturu!

La tago estis suna, klara. La neĝo blindige brilis. En la arbaro estis silento kaj transmonda trankvilo.

Necesis veturi malproksimen – ĉirkaŭ dudek verstojn: oni malpermesis haki arbojn pli proksime.

Naĥumo veturis antaŭe kaj senĉese grumblis:

– Diablo komprenu!.. Ni devas veturi el arbaro al arbaro – por ligno.

Ivano dormetis en sia sledo. La egalmezura balancado de la sledo lulis lin.

Ili atingis senarban strion[2], veturis malsupren en malfermitan valeton kaj leviĝis sur la monteton. Tie, sur la altaĵo, denove, kiel blua muro, staris arbaro.

Ili preskaŭ atingis la montetosupron… kaj ekvidis, ne fore de la vojo, staris kvinopo. Ili eliris el la arbaro kaj staras, atendas. Lupoj.

Naĥumo haltigis la ĉevalon kaj mallaŭte, kvazaŭ kantante, blasfemis:

– Ĉiujn sanktulojn viajn kaj la patrinon… Jen grizbluaj kolomboj… Ili poziciiĝis.

La ĉevalo de Ivano, juna kaj timema, retroiris kaj surpaŝis trans la timonon de la sledo. Ivano komencis tiri la kondukilojn, turnante la ĉevalon. Tiu ronkis, prancis – sed ne povis retropaŝi trans la timonon.

La lupoj ekiris de la monto.

Naĥumo jam turniĝis kaj kriis:

– Nu, ĉu vi ne vekiĝis?

Ivano elsaltis el la sledo, pene enpuŝis la ĉevalon inter la timonoj… kaj falis en la sledon. La ĉevalo mem turniĝis kaj ĵetis sin al galopo.

Naĥumo jam estis malproksime.

– Rabo-o! – li histerie kriegis, vipante la ĉevalon.

La lupoj kiel grizaj buloj mole ruliĝis de la monto, transverse al la vojo de la sledoj.

– Rabo-o! – kriegis Naĥumo.

“Ĉu li freneziĝas? – subite pensis Ivano. – Kiu kiun rabas?” Li ektimis, sed iel strange: samtempe estis kaj timo kaj forta scivolemo, kaj moka rido pri la bopatro. Tamen la scivolemo baldaŭ ĉesis. Ankaŭ la ridemo malaperis. La lupoj elkuris al la vojo cent metrojn post la sledo kaj, forminte spaliron, komencis rapide atingi ĝin. Ivano firme kroĉiĝis al la sleda antaŭaĵo kaj fikse rigardis la lupojn.

Antaŭe kuris granda, vastbrusta besto kun makulita muzelo… Jam nur dek kvin aŭ dudek metroj apartigis ĝin de la sledo. Ivanon konsternis tio, ke la lupo tute ne similas al ŝafhundo. Antaŭe li neniam vidis lupojn tiel proksime kaj pensis, ke ili estas kiel ŝafhundoj, sed pli grandaj. Nun li komprenis: lupo estas lupo, sovaĝa besto. Eĉ plej furiozan hundon io povas lastmomente haltigi: timo, kareso, subita ordona krio de homo. Tiun ĉi, makulmuzelan, povis haltigi nur la morto. Ĝi ne roris, ne timigis… Ĝi simple penis atingi la viktimon. Kaj la rigardo de ĝiaj rondaj flavaj okuloj estis rekta kaj simpla.

Ivano pririgardis la sledon – nenio estas, eĉ ne malgranda vergo. Ambaŭ hakiloj estas en la sledo de la bopatro. Nur fasketo da fojno sub lia flanko kaj la vipo en la mano.

– Rabo-o! – kriis Naĥumo.

Ivanon atakis vera timo

La antaŭa lupo, evidente la gvidanto, komencis devanci la sledon flanke, celante la ĉevalon per sia rigardo. Ĝis ĝi estis nur ĉirkaŭ du metroj… Ivano iom leviĝis kaj, kroĉinte sian maldekstran manon al la sleda rando, vipegis la gvidanton. Tiu ne atendis tion, klakis per la dentoj, saltis flanken, perdis la ritmon… Kaj la aliaj lupoj jen trafis en lin de malantaŭe. La tuta luparo en plena kuro haltis ĉirkaŭ la gvid-

anto. Tiu sidiĝis sur siaj malantaŭaj kruroj, batis per siaj dentegoj jen unu lupon, jen alian… Kaj denove ĝi, kurante antaŭe, facile atingis la sledon. Ivano pretiĝis, atendis la ĝustan momenton… Li intencis denove vipi la gvidanton. Sed tiu komencis devance preteri la sledon en pli granda distanco. Ankoraŭ unu lupo foriĝis flanken de la luparo kaj ankaŭ komencis preteriri la sledon de la alia flanko. Ivano kunpremis la dentojn, sulkis la vizaĝon… “La fino. La morto”. Li ĵetis la rigardon antaŭen.

– Haltu-u! – li kriis. – Patro!.. Donu hakilon!

Naĥumo vipegis sian ĉevalon. Li ekrigardis malantaŭen, vidis kiel la lupoj devancas la bofilon, kaj rapide forturniĝis.

– Iom bridu la ĉevalon, patro!.. Donu al mi hakilon! Ni defendos nin!..

– Rabo-o!

– Iom bridu la ĉevalon, ni defendos nin!.. Bridu iomete, hida bastardo!

– Ĵetu ion al ili! – kriis Naĥumo.

La gvidanto kuratingis la ĉevalon kaj atendis momenton por salti sur ĝin. La lupoj, kurantaj malantaŭe, estis tre proksimaj: okaze de plej eta prokrasto ili plenrapide saltos sur la sledon – kaj jen la fino. Ivano ĵetis flokon da fojno; la lupoj ne atentis tion.

– Patro, hundinaĉo, bridu ilin, ĵetu hakilon!

Naĥumo turnis sin:

– Ivaĉjo!.. Vidu, mi ĵetas!..

– Vi malakcelu vin!

– Vidu, mi ĵetas! – Naĥumo ĵetis hakilon sur la randon de la vojo.

Ivano elektis momenton… Li saltis el la sledo, kaptis la hakilon… Dum la salto li timigis tri malantaŭajn lupojn – ili saltis flanken, bremsis la kuradon, pretiĝante ĵeti sin al la homo. Sed tiumomente la gvidanto eksentis sub si duran neĝkruston kaj saltis. La ĉevalo kuris flanken, en neĝamason… La sledo renversiĝis: la timonoj tordis la ĉirkaŭkolon, ĝi ĉirkaŭpremis la gorĝon de la ĉevalo. La ĉevalo stertoris kaj ekkonvulsiis inter la timonoj. La lupo, kiu atingis la viktimon de la alia flanko, saltis sub la ĉevalon kaj per bato de sia ungo-hava piedo disŝiris ĝian ventron laŭlonge.

Ankaŭ la tri lastaj lupoj rapidis al la viktimo.

En la sekva momento la tuta kvinopo ŝiris la karnon de la ankoraŭ skuiĝanta ĉevalo, kun murmurado distrenis sur la blindiga blanka neĝo vaporantajn bulojn de grizbluaj-ruĝaj intestoj. La gvidanto dufoje rigardis per siaj flavaj rondaj okuloj rekte al la viro…

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

La folio

de Paulo S. Viana

Iradis maljuna homo laŭ larĝa avenuo en granda urbo, en malfrua nokto, sub pluveto kaj leĝera, malvarmeta vento somera. Pasadis lumoj, kaj sonoj, kaj homoj, iuj kun la kapo klinita malsupren, aliaj vigle parolantaj malgraŭ la malfrua horo. Kelkaj grupoj ankoraŭ trinkis bieron antaŭ drinkejaj servotabloj, dum senpretendaj, infanecaj konversoj taŭgaj por fino de labortago. Sed la maljunulo atentis nur pri la malseka plaŭdetado de siaj ŝuoj sur la akvomembrano, kiu etendiĝis sur la trotuaro. Tio estis maniero konservi la menson okupita. Duono de la semajno jam pasis, la vivo iras al sia fino, la pluvo kaj la lumoplena avenuo plu restos. Certe malmulte da intereso troviĝas ĉirkaŭ iaj bierglasoj.

Venis al li la deziro trinki kafon. Li proksimiĝis al vendotablo ĉe la trotuaro, petis kafon kaj unu folion de blanka papero. La kelnero mienis mire.

– Folion de papero?

– Jes, unu folion.

– Pardonu min, ni ĉi tie ne havas paperfolion. La papero, kiun ni ĉi tie havas, estas kruda, por malgrandaj pakoj. Ĉu taŭgas al vi folio por buŝpurigo?

– Ne, ĝi ne taŭgas, sed iel ajn, en ordo, mi dankas.

Kontentiĝis la deziro trinki kafon, sed ne tiu havi en la mano folion de papero. Li revenis sur la trotuaron, afliktite rigardis la avenuon, serĉe de iu loko, kie oni povus tion doni al li. Drinkejoj kaj restoracioj ne proponas paperon. Blanka paperfolio taŭgas por skribado, kaj en tiaj lokoj oni kultivas nur la parolatajn vortojn, ĉirkaŭ bierglasoj. Tio estas la sama afero, nome vortoj, sed tre malsama estas ilia loĝejo, kiam ili loĝas en la buŝo, inter la voĉkordoj, aŭ kiam ili trankvile kuŝas sur papero.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:
https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Malmultekosta loĝejo

de Laure Patas d'Illiers

"Malmultekosta loĝejo en Parizo? Vi frenezas, vi ne trovos!" – Jen kion ĉiuj diris al mi.

Kun aŭdaco de dudekjarulino mi tamen iris al Parizo kaj ekserĉis. Post vana semajno, mi estis plendanta en eta kafejo, en la strato Botzaris [bocaris]. La kelnero aŭskultis min, kiel aŭskultas kelneroj kaj frizistoj. "Vizitu ĉiujn pordistojn en nia strato. Pordistoj scias kiam loĝanto foriras".

Mi eluzis miajn plandumojn. Ĉe la dudeksepa pordisto – maljunulo kun kurba dorso – blovis favora vento. "Telefonu al sinjorino Alaric [alarik], jen ŝia numero. Ŝia studento en la sepa etaĝo hieraŭ forvaporiĝis".

Mi tuj telefonis. Sinjorino Alaric respondis post tri sonoroj. "Bona novaĵo, mi estis publikigonta anoncon. Ho, vi jam surlokas. Atendu, mi tuj alvenas". Mi atendis sur la trotuaro, esperplene rigardante la fasadon por percepti la sepan ĉielon – nu, la sepan etaĝon.

La loĝejo estas perfekta por studento, ripetis sinjorino Alaric. Ŝi pravis. Ĝi estis malgranda sed taŭge kaj praktike instalita. Mankis nenio, nek korktirilo, nek pordomato. Sinjorino Alaric malfermis kaj fermis pordojn de murŝrankoj, esplorrigardante min kaj eldirante lavangon de malpermesoj. "Estu atenta. La mebloj estas el fagoligno, ne surmetu sur ilin malsekan glason. Estas malpermesite fumi, eĉ apud malfermita fenestro. Neniu brua agado, neniu festo de studentoj. Ĉi tie dormu ununura persono. Vi komprenis min. Neniu koramiko".

Miaflanke mi esperis, ke videblas miaj atutoj. Ineco. Kvieta kaj humila sinteno. Simpla ordinara vesto. La fakto ke mi studas matematikon – proprietuloj ofte amegas kulturon sed malemas ludoni al studentoj pri muziko aŭ danco.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Almenaŭ unu savita manuskripto

Laxness, Halldór. Sonorilo de Islando / Tradukis el la islanda lingvo Baldur Ragnarsson. – Novjorko: Mondial, 2025. – 399 p.

> La reĝo volas vendi Islandon. La danaj reĝoj ĉiam estis pli ol pretaj vendi aŭ lombardi tiun posedaĵon, nur estis tiel, ke eksterlandaj princoj ĉiam trovis tie malhelpojn. Sed nun venis al tio, ke aĉetonto estas trovita. Germanaj homoj en Hamburgo volas aĉeti la landon. Sed ili ne fidas al si teni la landon, krom se ili ekhavos gubernatoron popularan ĉe la popolo, kaj estas ilia ideo, ke mi estas tiu homo.

La romano “Sonorilo de Islando” de Halldór Laxness rekondukas nin al la 1700aj jaroj, la epoko de koloniismo, kiam landoj kaj ties loĝantaroj estis kvazaŭ privata posedaĵo de la Moŝtulo, en tiu okazo la dana reĝo. (Evidente tiu pensmaniero ankoraŭ ne formortis komplete.)

Tiam Islando estis kolonio de Danlando. “Sonorilo de Islando” ne estas historia romano, sed romano, kiu uzas elementojn de la historio kaj traktas la kronologion libere. Tiu ĵonglado plialtigis mian plezuron dum la legado, ĉar estas detaloj, kiuj malkaŝas kiom profunde la aŭtoro esploris la epokon. Mallonga antaŭparolo skizas la historian fonon.

La romano estas en tri partoj kun tri ĉefprotagonistoj. En la unua parto (“Sonorilo de Islando”) ni renkontas la farmiston Jón Hreggviðsson. Li ŝtelis fiŝhokan ŝnuron, kio estas grava krimo sub la dana reĝimo. Li estis skurĝata. Poste Jón kaj la pendumisto drinkas kune. La sekvan tagon la pendumisto estis morta kaj Jón mortokondamnita. Li sukcesas eskapi al Holando kaj vagas tra Eŭropo kaj finfine revenas tra Danlando al Islando. Li resumas siajn spertojn en tia maniero:

> “Mi kraĉas sur Tiujn Grandajn, kiam ili kondamnas maljuste,” diris Jón Hreggviðsson. “Kaj tamen mi kraĉas sur ilin ankoraŭ pli, kiam ili kondamnas juste, ĉar tiam ili timas. Kredu, ke mi konas mian reĝon kaj lian pendumiston. Mi dehakis la sonorilon de Islando, eltenis hispanan jakon en Glukkstad kaj surhavis mian Paternoster en Kopenhago. Kiam mi revenis hejmen, mia filino kuŝis sur la mortolito. Mi ne fidus al ili akompani senkulpan infanon trans rivereton, ne dronigante ĝin”.

La vivo, kiu konsistas el batoj

“La damo de lumo” de la dua parto estas Snæfríður Íslandssól, kiu en la unua

parto ebligis la eskapon de Jón. Snæfríður volas rilaton kun Arnas Arnæus, erudito de la islanda prahistorio, sed tio ne eblas. Do ŝi decidas: ”Prefere la plej malbonan ol la duan plej bonan.” Konsekvence ŝi edziniĝas kun mizera junkro kaj eltenas ties kapricojn:

La homo staris ridanta en la pordapertaĵo. Ŝi lasis lin ridi kelkan tempon antaŭ ol ŝi levis la kapon. Tiam ŝi levis la kapon. Lia barbo estis pli ol semajnon aĝa kaj li havis nigran okulon, krome oblikvaj skrapvundoj sur vango kaj nazo, la seka sango estis nigra. Mankis al li du frontaj dentoj. Liaj manoj estis ankaŭ skrapvunditaj. Li ridis kun treegaj grimacoj kaj stumblis aŭ malantaŭen aŭ antaŭen, tiel ke estis malfacile vidi en kiun direkton la homo falus, en la ĉambron aŭ eksteren.

Ŝi diris: “Multon mi povus pardoni al vi, Magnús mia, se vi ne estus lasinta elbati tiujn du frontajn dentojn lastjare.”

Ŝi rigardis suben al sia laboro.

“Kiel vi arogas al vi tiel alparoli la junkron de Bræðratunga?” li diris.

“Kiu putino vi estas?”

“Via edzino,” ŝi diris kaj daŭrigis la brodadon.

Li ŝanceliĝis en la ĉambron kaj peze ĵetis sin sur ŝian vestokeston, kaj kolapsis en senvivan amason, sed post kelka tempo penis sin vivigi kaj levis la kapon, liaj okuloj estis blankaj en la nigra ŝelaĵo, ĉiu homa trajto forviŝita.

“Ĉu mi eble ne estas de la plej altranga familio en la sudlando? Ĉu mi ne estas filo de la leĝisto en Bræðratunga, la plej riĉa homo en komunumoj? Kaj ĉu mia patrino ne pezis pli ol du cent funtojn?”

Ŝi diris nenion.

La vivo de islandanoj konsistas el eltenoj

Arnas Arnæus zorgas en la tria parto “Fajro en Kopenhago” pri la nuligo de la kondamno al morto de Jón. Arnas serĉas ĉie malnovajn islandajn manuskriptojn, kiuj atestas la iaman gloron de lia hejmlando. Li fieras pri la impona beleco de sia lando. Jen li priskribas al germana komercisto siajn sentojn kiam li vidas la marbordon de Islando:

Arnæus troviĝis denove en profundaj pensoj. Fine li demandis mediteme:

“Ĉu mia sinjoro iam marveturis al Islando?” La Hamburgano respondis per ne al tio, sed scivolis kial li demandas.

“Mia sinjoro ne vidis Islandon leviĝi el la maro post longa kaj malfacila marveturo,” diris Arnas Arnæus.

La komercisto ne klare komprenis.

“Tie leviĝas ventobatitaj montopintoj el ŝaŭmanta maro kaj glaciejaj rokegoj ĉirkaŭvolvitaj per ŝtormaj nuboj,” diris professor atiquitatum Danicarum.

“Jes ja, kaj?” diris la Germano.

Arnas Arnæus diris: “Mi staris ŝirmflanke sur ferdeko de ŝipo, sekvante la vojon de tiuj veterbatitaj marrabistoj el Norvegujo, kiuj longtempe drivis sub la ventoj sur la maro; ĝis subite leviĝas tiu bildo.”

“Memsekve,” diris la Germano.

“Ne ekzistas pli timige impona vidaĵo ol Islando, kiam ĝi leviĝas el la maro,” diris Arnas Arnæus.

Arnæus kolektis kaj savis malnovajn manuskriptojn pri la heroa antikva historio de sia lando. La plej granda parto perdiĝas en granda fajro.

Mi priploras la librojn de mia sinjoro. En liaj libroj, kiuj nun forbrulis, estis konservitaj la vivo kaj animo de tiuj popoloj, kiuj en la Nordio parolis la danan lingvon el antaŭ la diluvo ĝis tiu tempo, kiam ili forgesis sian originon kaj germaniĝis. Mi ploras ĉar ne plu troviĝas libroj en la dana lingvo. La Nordio ne plu havas animon.

Kiom da dokumentoj ni perdis dum la historio? Sennombrajn! La detruo de la biblioteko de Aleksandrio, la forbruligo de la majaaj kodeksoj, la atako al la nacia biblioteko de Sarajevo, aŭ la detruo de la muzeo de Maria Primaĉenko… homa stulteco, foje kun forta subteno de la povoj de naturo detruis la homan kulturon. Al tiuj minacoj aldonendas nun ankaŭ laktokafo. Kiam la tradukinto Baldur Ragnarsson hazarde verŝis grandan tason da kafo sur la klavaron de sia komputilo, la traduko de la “Sonorilo de Islando” malaperis – ĝis nova tekniko ebligis suĉi la manuskripton el la obstina komputilo.

Almenaŭ unu savita manuskripto.

Wolfgang Kirschstein

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:
https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humuristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

Ha lo, polico!

Kiam mi estis infano, la patro portis min per boato mezen de rivero kaj forĵetis en akvon. Mi sukcesis atingi la bordon, venis al polico kaj raportis la atencon. Tiel la patro instruis min denunci.

Telefonvoko:
– En mia hejmo estas murdisto!
– Ne timu, evidente li ne estas profesiulo...

Telefonvoko:
– Miaj najbaroj vendas mariĥuanon!
– Ĉu? Kio estas la prezo?
– Unu dozo kontraŭ 10 dolarojn.
– Tro koste, ne aĉetu.

Telefonvoko:
– Polico, savu min, mi estas ŝtelita de aliplanedanoj!
– Ĉu vi estas ebria?
– Jes. Terura koincido!

Nokte krimuloj prirabis studion Disney. Matene polico havis ne nur registraĵojn de gvatkameraoj, sed ankaŭ duhoran animaciaĵon kun ĉiuj suspektitoj.

Judo trapasas doganejon:
– Ĉu en via valizo haveblas armiloj kaj narkotaĵoj?
– Mi ne scias, la panjo pakis ĉion.

Policano al arestita diboĉulo:
– Vi diris plurajn fivortojn surstrate kaj pro tio pagos mil dolarojn kiel monpunon. Ĉu vi deziras komenti?
– Mi deziras, sed ne kun tiaj prezoj!

Pridemandado en polico:
– Ĉu vi havas alibion?
– Kio estas la alibio?
– Nu, ĉu iu vidis vin dum okazis la murdo?
– Feliĉe neniu…

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Cistomba agemo

La verkprojekton iniciatis… la karmemora ZH dum li vivis. (Koko Sagbadjelou: Togolando kulture, MSD-EKBP, p. s. ČES, 2024, p. 28)

Kiel la fato disponos?

UEA devas esti ĝisfatigita (Prof. Ruben Sánchez, https://groups.io/g/komitato-de-uea, 18 jul 2025)

Pli frue ol Zam mem

Thomas Bormann, ĵurnalisto el Germanio, esperantisto depost la 1870aj jaroj… (“Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”: bitlibro senpage elŝutebla”, https://sezonoj.ru/2024/02/gk-251, 18 feb. 2024; rimarkis Ionel Oneț)

Tra la mondo iras frota frapo

Mi frapis lin tiel frote kaj brutale, ke… mi eĉ sentis lian doloron. (Vasil Kadifeli, “Turka Stelo”, januaro 2021, p. 9; legis Rob Moerbeek)

Nekutima statutŝanĝo

… en Pollando oni pentris statuton de Zamenhof… (“Chezkeleo”, https://liberafolio.org/2021/08/24/uea-farigos-nur-sildo-super-agadoj-de-aliaj/#comment-7581)

Koko ludas jam

Nun, kiel vi pensas, kion ili el tio kokludis? (Dostojevskij: “Krimo kaj Puno”, trad. Andrej Parfentjev, Sezonoj, 1993, p. 122; rimarkis Russ Williams)

Matura levito edzohava

Judit Varga maturiĝis en 1999 en sia naskiĝurbo…. En 2018 ŝi estis levita subministro, en la sekva jaro ministro pri justico, kiun ŝi tenis ĝis 2023. Ŝi havis edzon kaj naskis trifoje. (https://eo.wikipedia.org/wiki/Judit_Varga_(juristo))

La profunda esenco

Libera Folio estas…. la skandalmema revuo de nia movado. (Roberto, https://liberafolio.org/2023/04/19/por-kio-utilas-libera-folio/#comment-9946)

Bita damniĝo

En 2017 la eldonejo Mondial… publikigis la novan eldonon, kaj ĝi apereis ankaŭ en la reto. (Invito al terminara revizio, cirkulero, Humphrey Tonkin, 24 jul 2023)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeĵda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Viloresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tôkyô-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornella de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Usono: Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103. Rete: eusa@esperanto-usa.org.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm